

# **Proletaria Kantaro**

## **de Eldona Kooperativo de S.A.T.**



**1924**

**Exported from Wikisource on 08/03/20**

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

---

# PROLETARIA KANTARO

1a—2a milo



---

ELDONA FAKO KOOPERATIVA DÜSSEDDORF :: LEIPZIG

## Enhavo

	Paĝo
<a href="#">Antaŭparolo</a> .....	3
1. <a href="#">Nia kanto</a> .....	7
2. <a href="#">La Internacio</a> .....	9
3. <a href="#">Himno (Fratoj al sun')</a> .....	12
4. <a href="#">Iru en vic' ni (La Kanto de proletarioj)</a> .....	13
5. <a href="#">La Proletaria Marseljezo</a> .....	14

6. <a href="#">Laborista Marseljezo</a> (rusa) .....	17
7. <a href="#">Komunista Marseljezo</a> .....	18
8. <a href="#">Socialista Marŝkanto</a> .....	20
9. <a href="#">Estis nia ĉi-tero</a> (norv.) .....	23
10. <a href="#">La Proletarioj</a> .....	26
11. <a href="#">Ruĝa Standardo</a> (pola) .....	29
12. <a href="#">Al barikadoj</a> (pola) .....	34
13. <a href="#">Kanto de libera spirito</a> (pola) .....	36
14. <a href="#">Forĝistoj ni...</a> (rusa) .....	40
15. <a href="#">La Batalo</a> (portugala) .....	41
16. <a href="#">La marŝo de l' junularo</a> (sveda) .....	47
17. <a href="#">Ruĝa Gvardio</a> (itala) .....	48
18. <a href="#">La juna gvardio</a> .....	51
19. <a href="#">Al la Sennaciularo</a> (originalo) .....	52
20. <a href="#">Gejunulara ĵurkanto</a> (juda) .....	54
21. <a href="#">Varŝavjanka</a> (pola) .....	59
22. <a href="#">Lodzjanka</a> (pola) .....	61
23. <a href="#">Ventegoj hurlu ĉirkaŭ ni</a> (pola) .....	62
24. <a href="#">Popolvolana himno</a> (rusa, antaŭ 1917) 64	
25. <a href="#">Dubinuŝka</a> (rusa, antaŭ 1917) .....	66
26. <a href="#">Kremla Sonorado</a> (post 1917) .....	69
27. <a href="#">Redonu mian monon</a> (angla) .....	70
28. <a href="#">Kanto kontraŭmilitarista</a> (nederl.) .....	72
29. <a href="#">Fil' de l' labor'</a> (sveda) .....	74
30. <a href="#">Revolucio</a> (franca) .....	76
31. <a href="#">Himno de la subpremitoj</a> (itala) .....	80
32. <a href="#">El la kamparana milito 1525</a> (germana) 82	
33. <a href="#">Funebra marŝo</a> (rusa) .....	84
34. <a href="#">Kanto de Siberiaj ekzilitoj</a> (pola) .....	86
35. <a href="#">Min kondamnu juĝantaro</a> (pola) .....	88
36. <a href="#">Katenmazuro</a> (pola) .....	90
37. <a href="#">En malliberejo</a> (estona) .....	92

38.	<a href="#">Kanto de l' laboro</a> (pola) .....	93
39.	<a href="#">Maja Marŝo</a> (pola) .....	95
40.	<a href="#">Estingiĝis radi' de l' espero</a> (pola) .....	98
41.	<a href="#">Filo de l' popolo</a> (germana) .....	99
42.	<a href="#">Tord Foleson</a> (norvega) .....	101
43.	<a href="#">Mallibereja</a> (ĉeka) .....	106
44.	<a href="#">Laboristoj ekvekjĝu!</a> (angla) .....	107
45.	<a href="#">Anarkista marŝo</a> (rusa) .....	108
46.	<a href="#">Marŝo de la laboristoj en Esperanto</a> (originalo) .....	109
47.	<a href="#">Ruĝa Regimento Varsovia</a> (pola) .....	111
48.	<a href="#">Funebra kanto</a> (rusa) .....	114
49.	<a href="#">Tenu la fortikaĵon!</a> (angla) .....	116
50.	<a href="#">La ruĝarmeana stelo</a> (rusa) .....	117
51.	<a href="#">Batalo</a> (bulgara) .....	120
52.	<a href="#">En la drinkejo</a> (bulgara) .....	123
53.	<a href="#">Antaŭen laboristaro</a> (hungara) .....	125
54.	<a href="#">Al batal'!</a> (pola) .....	127
55.	<a href="#">En malliberejo</a> (estona) .....	127
56.	<a href="#">Ekstaru ni Proletaroj</a> (hungara) .....	129
57.	<a href="#">Proletoj Unuiĝu!</a> (belga) .....	133
58.	<a href="#">Ni rompu niajn ĉenojn!</a> (belga) .....	136
59.	<a href="#">Laborista alvoko</a> (jugoslava) .....	138
60.	<a href="#">Himno (tipografista)</a> (jugoslava) .....	138
61.	<a href="#">Marŝo de finna Laboristaro</a> (finna) ...	148
62.	<a href="#">Mia preĝo</a> (bulgara) .....	150
63.	<a href="#">Haĝi Dimitro</a> (bulgara) .....	152
64.	<a href="#">La Soldata Kanto</a> (kastila) .....	156
65.	<a href="#">La liberula kanto</a> (hispana) .....	159
66.	<a href="#">La kanto de l' komunisto</a> (hispana) ..	161
67.	<a href="#">Ni eltenu!</a> (finna) .....	162
68.	<a href="#">La batalokanto de la ĉina revolucio</a> (ĉi	167

69. <a href="#">Ĉina laborista kanto</a> (ĉina) .....	168
70. <a href="#">Himno de l' laboristoj</a> (rusa) .....	169
71. <a href="#">Ruĝarmeaniĝo</a> (rusa) .....	170
72. <a href="#">La ĵuro</a> (hebrea) .....	172
73. <a href="#">Kamarada kanto</a> (bulgara) .....	173
74. <a href="#">La Karmanjolo 1924</a> (franca) .....	174
<a href="#">Indeksoj</a> .....	177





## ANTAŬRIMARKIGO

Fine ĝi aperis! Sed ĉu ĝi kontentigos ĉies dezirojn kaj pretendojn? Apenaŭ ni kuraĝas esperi tion. Tamen la plimulto trovos en tiu ĉi libreto, kion ĝi sopiris, trovos la vivecon de proletaria batalo, la unuecon de revolucia ideologio, la variecon kaj multnuancecon de l' temo okupanta unusola niajn animojn, entute, tion kion en tia unueca kaj sennaciiga formo ankoraŭ ne prezentis al ni nek nacilingva prolet-kantaro nek iu ajn kantaro laborist-esperantista.

Kaj la pli-pretendemuloj konsideru ke S.A.T., kvankam evoluinta ĉiudirekten kaj disvastiĝinta ĉiukontinenten, tamen en nuna stato de sia evoluo ankoraŭ ne profunde fiksiĝis en *ĉiuj* sektoroj kaj regionoj de nia terglobo. Se la alvoko por kunlaboro je ĉi-kantaro ankoraŭ ne penetris en *ĉiujn* angulojn de la kvin terpartoj, ni konkludu el tio, ke niaj penoj devas ankoraŭ multobliĝi por ke la forta voko trovu ĉiuloke plenvoĉan resonon.

Ni daŭrigu konstruadi nian palacon! Jen nova ŝtoneto en la fundamento de nia konstruaĵo! Donu ĝi bonajn fruktojn kaj utilon al niaj kamaradoj en agado!

Pri la aranĝo de l' kantaro ni rimarkigu nur, ke ni elektis la tekstojn laŭ nia vidpunkto pure revolucia. Ni do rifuzis enmeti eĉ bonajn kantojn, kiuj tamen ne servas al tiu celo. Aliflanke ni klopodis, ne nur publikigi nuntempajn batakantojn, sed ankaŭ tiajn el pasintaj epokoj, kaj penis, per klarigaj notoj, komprenebliĝi al la nuntempuloj kondiĉojn kaj medion, sub kiuj naskiĝis tiuj kantoj. Do kvazaŭ skizante je la sinsekvo de diversepokaj kantoj tutan historian evoluadon de l' proletaria klaso, ni plialtigas, ŝajnas al ni, la valoron de tiu verketo. Malfermiĝas antaŭ ni la longa emocia martira vojo de nia klaso dum jarcentoj de senlaca, suferiga luktado kontraŭ subpremantoj. Larĝiĝas la kadro, la perspektivo je giganteco...

Kantante tiujn elkorajn kriojn de proletaro el tuta mondo en nia unueca lingvo, ni fortikigos senton de solidareco, senton de kunuleco, de sennacieco.

Julio 1924.

*Eldona Kooperativo de S.A.T.*

---

1. Nia Kanto  
Muziko de *A. Szlendak*

En ĉiuj ŝaktoj sub la tero,  
En hejm' de ĉiu suferant',  
En ĉiuj de la mond' karceroj —  
Eksonu ĉie nia kant'!

Rek.: Hej! laboristaro —  
Al la finbatalo,  
Leviĝu suferant' —  
Signalon donas nia kant'!

En la fabrikoj, kie muĝas  
Spirego de l' maŝin-gigant',  
En laborejoj, kie suĉas  
Oferojn la ekspluatant' —

Rek.:

Ĝin ne haltigos regnaj limoj,  
Fiksitaj de la mon-regant'  
Kaj la ribelon en animoj  
Vekadas ĉie nia kant'!

Rek.:



En la palacoj fabrikistaj,  
En hejmoj de la sanga vant',  
Paliĝos la ekspluatistoj  
Je sonoj de ribela kant'.

Rek.:

Kaj kiam jugon fortaj sonoj  
Forskuos jam en ĉiu land'  
Do super kapitalo-tronoj  
Triumfos glore nia kant'!

Rek.:

*M. Michalowicz.* El la pola trad. M. A.

## 2. La Internacio

Degeyter kaj Pottier

Leviĝu, en mizer' dronanta  
Sklavar' malsata de la ter'!  
Raci' nin vokas indignanta  
Al mortbatalo pro l'liber'.  
Malnovan mondon ni detruos  
Ĝis fundament' de l'tirani'  
Kaj nian novan ni konstruos:  
Ne nuloj — ĉio estu ni!  
    !: Por finlukto socia  
    Ni grupiĝu en rond',  
    Kaj la Internacio  
    Triumfu en tutmond'! :!

Ne la cezar', nek dia volo  
La savon portos de l'tiran', —  
Liberon donos al popolo  
Nur ĝia propra forta man'.  
Por ke pereu la rabuloj,  
Por liberiĝu la spirit',  
Varmegan feron la forĝuloj,

Ni forĝu mem sen intermit'.

Premegas ŝtato laboriston,  
Imposto kaj konstituci';  
Favoras nur ekspluatiston,  
Favoras nur al tirani'.  
Sufiĉe da suferricevo.  
Laŭ egaleca la leĝar'.  
Neniu estas rajt' sen devo,  
Nek iu devo sen rajtar'.

Apoteoze abomenaj  
La reĝoj de minar' kaj rel'  
Ja estis ĉiam tro senĝenaj  
En sia parazita ŝtel'.  
En kas' konservis la friponoj  
Produktojn niajn de l'labor',  
Do per devigo al redonoj  
Niaĵon nur ni prenos for.

Estrar' nin trompis artifike, —  
Por ni do — pac'! por ĝi — milit'!  
Rompinte, la armeojn strike  
Ni lasu l'vicojn sen hezit'.  
insistis niaj kanibaloj,  
Ke kuraĝuloj estu ni, —  
Do kontraŭ propraj generaloj  
Ekpafos baldaŭ la gvardi'.

Nur ni, laborarmeaj eroj,  
De l'urboj kaj de la kampar',  
Posedas rajton pri la tero!  
Vi iru for, parazitari'!  
Kaj se por via bando puno  
Alvenos en la flamribel',  
Por ni ekbrilos hela suno  
Radiadante en ciel'.

kompil-tradukis *J. Zilberfarb*

### 3. Himno

Mel. Rusa Ruĝgardista marŝo

Fratoj, al sun', libereco,  
Fratoj, nun supren al lum'!  
! Hel' el mallum' estinteco  
Brilas estonto nin nun. !:

Vidu, la frataj milionoj  
Venas el nokto al ni,  
! Ĝis la sopir' de legioj  
Turnos lla sorton de ni. !:

Donu la manon nun, frato,  
Moku pri morto kaj fal':  
! For la sklavec' kaj malsato,  
Sankta la lasta batal'! !:

#### 4. Iru en vic' ni...

(La kanto de proletarioj.)

Kantebla laŭ la melodio: [Fratoj al sun' N.ro 3](#)

Iru en vic' ni laŭtakta, —  
Kaj plifortiĝos spirit',  
Al libereco verfakta  
Venos ni ne sen milit'.

Oni nin tenis en ĉenoj,  
Longe turmentis malsat',  
Pasis la temp' de malbenoj,  
Sonas pri venĝ' horloĝbat'.

Estas jam temp' por komenci,  
Al la batal' kun rapid'!  
Ĉu ni ne povas intenci  
Vivi sen ora bovid'?

Estas popolaj ni idoj,  
De laboranta popol',  
De la fratligo decidoj —  
Nia devizo kaj vol'.

Tronoj ekzistas la brilaj

Pro laborista dormad’;  
Estu do preta pafilo,  
La bajonet’ kaj grenad’!

Agon kredante tre loga,  
Vicojn lutinte per fer’,  
Iru batali aroge  
Ni kontraŭ jug’ de mizer’.

Per nia man’ ni forigos  
Premon de multa centjar’,  
Nin la laboro kunligos,  
Flirtos la ruĝa flagar’.

El la rusa trad. *G. Rozenblat.*

## 5. La Proletaria Marseljezo (laŭ motivo de marseljezo<sup>[1]</sup>)

De marseljez' malnovan kanton  
Laŭ nova senco kantos ni —  
Ektremu la ekspluatantoj —  
Vekiĝis jam proletari'!

En la libera kanto nia  
Minacoj sonu de l' popol',  
Potenca krio, venka ĥor,  
Tutmonda vok' internacia:  
Antaŭen laborist',  
Kuniĝu al batal'!  
Batal'! Batal'!  
Al mortbatal'  
Antaŭen laborist'!

Jarcentojn daŭris lukt' obstina  
Kaj ofte pagis per ribel'  
Popolo pro subprem' senfina,  
Renversis ordon per martel'.  
Ankoraŭ tamen vok' nenia  
Per tia granda spiris fort'  
Kaj ne minacis iam kord'



De tiu kant' internacia:  
Rekantaĵo.

Potenca malamik' burĝaro  
Sed venas jam de l' juĝo tag';  
En senkompata ondegaro  
Alvenas jam ilia pag'....  
Ĝi mem per sia propra mano  
La glavon forĝas kiun ni  
Returnos iam kontraŭ ĝi,  
Kaj falos regno de tiranoj.  
Rekantaĵo

Ĉesigos viajn ni festenojn,  
Nin ne timigos mortbatal';  
Ni perdos solajn nur katenojn,  
Sed nia estos la kampar'!  
Mizeraj tremu vi, premantoj!  
Resonas ĉie nia kant',  
Sub ruĝa la batalstandard'  
Jam ĉiuj sin kunigas landoj.  
Rekantaĵo.

En land' despote premegata  
Aŭskultu! — venas uragan':  
Al lukt' kun premo senkompata  
Leviĝas jen popol' — titan'.  
Kaj antaŭ suno de vekigo  
En ombron jam foriĝas vi!

Antaŭen! Brilas jam radi'  
Radi' de l' tag' de liberiĝo.

Antaŭen laborist'!  
Kuniĝu al batal'!  
Batal', batal',  
Al mortbatal'  
Antaŭen laborist'!

## Piednotoj

1. [↑](#) La originala “Marseillaise“ (Marselana) estas verkita de R o u g e t d e L ’ i s l e , rojalisto, kiu faris la versojn en nokto de 25-26a de aprilo 1792 (post militdeklaro) en Strasburg por ekflamigi al milito kontraŭ Prusio-Aŭstrio. Sian vastan gravecon la kanto ricevis nur, post kiam ĝi estis kantita de la jakobinoj en Marseille dum partifesto (junio 1792). Ĝi fariĝis revolucia kanto kaj estis kantata dum la enmarŝo en Paris kaj atako al Tullerioj. Multajn laborist-kantajn tekstojn oni alfaris al la melodio de Marseljezo, el kiuj ni presigas tri en ĉi tiu kantararo. —

## 6. Laborista Marseljezo

(Rusa)

Ni de l'mondo malnova foriru,  
Forskuu ĝian polvon ni!  
Kun la ora idol' ligojn ŝiru  
Kaj disfalos la sangimperio'.

Al matsata homaro ni venos,  
Al mizera ni venos homar';  
Kune ni la krimulojn malbenos,  
Ni ĝin vokos al fina batal'.

Rek.: Leviĝu, stariĝu, malsata popolo!  
Leviĝu al venĝa batalo,  
Eksonu voko de l'homaro:  
Antaŭen al batal'!<sup>[1]</sup>

Riĉularo diskaptas avide  
Fruktojn de la penega labor',  
Lastan pecon elŝiras inside  
Kaj grasiĝas per ŝvit' de l' popolo'.  
Vi malsatu, vin ili ofendu  
Kaj en aĉa, surborsa spekul'  
Konsciencon, honoron disvendu,  
Dum festenas mokanta riĉul'.

Rek.:

Por vi tombo ripozo unika!  
Tutan vivon penegu sen fin’;  
Car’-vampir’ viajn fortojn eligas,  
Car’-vampiro suĉadas ja vin.

Li bezonas militojn minacajn —  
Viajn filojn donadu al li!  
Li bezonas festenojn, palacojn —  
Vian sangon donadu al li!

Rek.:

Ĉu doloro ne estas tro granda?  
Ni leviĝu en venĝa konsent’!  
Ĉiuj partoj de la patrolando  
De sud’, nord’, orient’, okcident’!  
Je ŝtelistoj, je hundoj — riĉuloj,  
Je malica vampiro — la car’!  
Batu ilin, pereu krimuloj  
Kaj denove ekvivos homar’!

Rek.:

Kaj leviĝos post sanga aŭroro  
De la vero kaj amo radi’,  
Kvankam pagis ĝin granda valoro —  
Varma sango de l’ proletari’.  
Kaj en sanga popoloj-batalo  
Malaperos mizer’ kaj dolor’,  
Kaj kuniĝos libera homaro,

En la regno de sankta labor’.  
Rek.:

## Piednotoj

1. ↑ Uzu dum kantado fintekston de [n.o 5](#) akomode al melodio presita.

## 7. Komunista Marseljezo

De *Demjan Bednij*<sup>[1]</sup>

(Melodio sama kiel [n.o 5](#))

Ni — de brulo tutmonda la ardo  
Ni forbatis katenojn de l' sklav'!  
Komunism' — nia ruĝa standardo  
Kun deviz': en batalo la sav'.

Kontraŭ la raŭkiĝintaj de krio  
Parazitoj de nia labor'  
Batalados ni kun energio  
Ĉiuj kune, kun sama fervor'.

Honestaj, armiĝu sen tim' kaj ŝancel'!  
Pereu la mondparazitoj!  
Ni venkos, aŭ mortos venkitaj!!!  
Al cel', al cel', al cel', al cel', al cel'!

La pereo multnombra de fratoj,  
De l' patrinoj malriĉaj la plor',  
La vundado de l' homoj per batoj,  
Jen — la kaŭzo de l' ruĝa teror'!  
Do, memoru dum nokto kaj tago,  
Adorantoj de l' or' sur la ter',  
Por vi venis la hor' de l' ŝuldpago

Bienul', aferist' — bankier'!

Rekantaĵo.

Al tombistoj de l' volo popola,  
Sin nutrantaj per nia labor',  
Kies estas profit' monopola  
La fabrik' kaj preĝeja trezor',  
Al kanajloj pro kies profitoj  
Oni mortis en la agoni'  
Dum sovaĝaj, sangverŝaj militoj, —  
Grandan konton prezentas nun ni.

Rekantaĵo.

Nin minacas la burĝa ŝakalo,  
Sed jam venis por ĝi morta fin',  
Ni ĝin vokas al lasta batalo  
Senkompataj pro ĝia obstin'.  
Sen hezit', agu do, batalantoj,  
Nin ŝakaloj ne trompu per pac',  
Sur malnovaj ruinoj — gigantoj  
Nia hela ekbrilos palac'!

Rekantaĵo.

Ĉia-ajn en la mondo laboro  
Por kaleca konvenas la man',  
Sed neniam de nia fervoro  
Pliriĉiĝos la burĝo-tiran'.

La fripone rabita monsumo  
Plu ne kreskos en ies angul',  
Ĉar en nia labor-komunumo  
Estas nek malriĉul', nek riĉul'!

Rekantaĵo.

Kontraŭ ĉiuj vampiroj, skorpioj,  
Kontraŭ burĝa, fipastra la vol'  
Tuj leviĝu, la proletarioj,  
La rabita, malklera popol'!  
Tuj leviĝu pro la idealo,  
La infanoj de l' granda mizer'!  
Unuiĝu por lasta batalo,  
Defendantoj de l' frata afer'!

Rekantaĵo.

Elrusigis A. Jodko.

## Piednotoj

1. ↑ Rim. Demjan Bednij (t. e. Demjan Malriĉa) estas pseŭdonimo de famekonata sovetl. proletaria poeto (nuntempa) E. A. Pridvorov.



## 8. Socialista Marŝkanto

Teksto de *Max Kegel* — Muziko de *Karl Gramm*

Trad. el germ. *W. Nutters*

Socialistoj densariĝu!  
Standardon ruĝan sekvu ni!  
Labora sklavo, liberiĝu!  
Katenojn ĵetu for de vi!  
Ne plu malsato kaj mizer',  
Feliĉo, paco sur la ter':  
Forigi mankon kaj sklavecon,  
Konkiri panon, liberecon,  
Jen nia sankta ideal' (*dufoje*).

Venu al ni, ĉiu el vi,  
Internaci', ekvenu ĝi!

Vi, milionoj proletaroj,  
En urboj, kampoj, sur la mar',  
Sennombraj sklavnaskitaj aroj,  
Prematoj kaj malsatular':  
Aŭskultu nin, stariĝu vi —  
Se kunaj, ĉion venkos ni!  
Por rekonstrui nunan mondon,  
Ni nur bezonas fortan rondon

De ĉiulanda gefratar' (*dufoje*).

Do ankaŭ vi, venu al ni!  
Internaci', kreskadu ĝi!

Ne per armiloj de l' barbaroj,  
Per pulv' nek sabro luktas ni!  
Spiritan lumon al la aroj  
Ni portos — nur ja venkos ĝi!  
Ne plu subpremo kaj perfort',  
Ekregu paco, vera ord'!  
Sur tero estu paradizo,  
Jen nia sankta la devizo,  
Jen nia alta ideal'! (*dufoje*).

Venu al ni, ĉiu el vi,  
Internaci', vekigu ĝi!

## 9. Estis nia ĉi-tero

Norvega Marŝo

Johan Evje

Estis nia ĝi, nia ĉi-ter',  
Kaj posedis, heredis ni ĝin,  
Por dividi sen prem' en liber'  
Ĝin por nia komuna destin'.  
Ni devenis el sama la rang',  
Nobelar' estis unu jen nur, jen nur,  
Ĝi naskiĝis el pura, el pura natur',  
Kia bolas indigne en sang'.

Estis ni multiĝantaj sur ter',  
Kvankam ŝvite prizorgis ni ĝin.  
Do tuŝetu da amo nin er',  
Kiel filoj de l' riĉa patrin'.  
Ni ja estas de l' tero sklavar',  
Kaj dum tago kaj nokt' nia pen', nia pen'  
Estas servi ĉe l' riĉa, ĉe l' riĉa festen'  
Al diboĉa senhonta mastrar'.

Unufojon nur vivas ni nun,  
Ĉio kroma — mensog', fantazi':  
Do ni volas ĝin vivi en sun',  
Kiel rajtas ĝin vivi eĉ ni!

Jes, ni volas ĝin vivi en sun',  
Kiel decas al homa la gent', la gent'.  
Ne nur rajto ĝi estas kaj restas, pretend',  
Sed la devo je nia komun'.

Kamaradoj, tra l' vasta tutmond'  
Jam ekbruas la demonstraci',  
Kaj aŭdiĝas centlingve en rond':  
Tiu ter' apartenas al ni!  
Jes, al ni apartenas ĝi nur!  
Ni dividu ĝin sen la ĵaluz', ĵaluz',  
Se ne estu je l' tago de l' ago konfuz',  
Ne vidiĝu sangruĝa terur'.

Kamaradoj, minacas ekflam',  
Tra la mond' ruliĝanta konspir'.  
De la voloj baritaj malam'  
Nun bruladas en arda sopir'.  
La malamo flamanta en kor'  
Kontraŭ tempo de l' vok' en dezert', dezert',  
Kiam neresponditaj petegoj, avert',  
Niaj voloj fariĝas vapor'.

Nin premadu ilia prosper',  
Potencega perfort' de arme',  
Estu sataj pro nia mizer', —  
Baldaŭ venos ilia pere'!

Vin kunigu kuraĝe standard',  
De l' estonta sunbrila liber', liber'.  
Kamaradoj, vi multaj, vi multaj sur ter',  
Por la viv' de justec' kaj bonfart'.

*Nils Collett Vogt.*

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 10. La Proletarioj

Teksto de *Joh. Most*, kompil-traduko de *N. B.*  
Melodio laŭ la germana kanto: „Zu Mantua in Banden“.

La oron kiu fosas,  
Martelas en ŝtalej’?  
Kulturas la kamparon  
Kaj teksas en drapej’?  
Kaj zorgas pri l’riĉula sat’,  
Mem vivas en mizera stat’?  
    :|: Dungitoj<sup>[1]</sup>, laboristoj,  
    La proletariar’ :|:

Kaj kiu konsumiĝas  
Dum tutaj nokt’ kaj tag’?  
Bonstaton, lukson kreas  
Por fremdaj sen repag’?  
La mondoradon movas li,  
Sed rajton havas je neni’?  
    :|: Dungitoj, laboristoj,  
    La proletariar’ . :|:

Sklavigis kiun ĉiam  
Tirana, raba band'?'  
Oferti devis sangon  
Por ili batalant'?'  
Popol', komprenu, estas ci,  
Trompata ĉiam sen konsci'!  
    !: Vekiĝu, laboristoj!  
    Ci proletariar'! !:

Kunigu fortojn viajn  
Sub nia ruĝa flag'!  
Por libereco luku  
Kaj por pli bona tag'!  
Despotojn pelu for el mond'!  
Ke estu pac' en tera rond'!  
    !:Batalu! laboristoj,  
    Ci proletariar'! !:

Potencon vi posedas  
Per unueca lig',  
Firmigu do la vicojn  
Por fina liberig'!  
Antaŭen, kontraŭ la kanajl'!  
Ne vin timigu la mitrajl'!  
    !: Vi venkos laboristoj,  
    Ci proletariar'! !:

# Piednotoj

1. [↑](#) En agrikulturaj regionoj oni variu: farmistoj, laboristoj.



## 11. La Ruĝa Standardo

*Boleslavo Czerwienski*<sup>[1]</sup>

El pola originalo esperantigis *Eska*

De sango nia fluas lago,  
De larmoj niaj estas ĝi;  
Sed venos tago de l' repago,  
Juĝantoj tiam estos ni,  
Juĝantoj tiam estos ni!

Rekantaĵo: Kune do, sonu kant' de l' falang',  
Standardo flirtas en fulm' ruĝa  
Kaj kun ĝi nia venĝ' per lavang'  
De la estonta dank',  
Koloro ĝia estas ruĝa,  
Ĉar sur ĝi laborista sang',  
Ĉar sur ĝi laborista sang'!

Disiĝas jam de l' nokto nuboj,  
Kaduka jam malnova ŝnur',  
Malbono falos en la rubojn,  
Eterne bono vivos nur,  
Eterne bono vivos nur!

Rekantaĵo: Kune do ktp.  
Disfalas jam malnova ordo,  
Por ni do restu ĝi ekscit',  
Laboros ni en la konkordo,

Komuna estos la profit',  
Komuna estos la profit'!

Rekantaĵo: Kune do ktp.

Do kune agu la frataro,  
Kun sama penso, man' ĉe man',  
Haltigos nin nenia baro,  
Nek ektimigos uragan',  
Nek ektimigos uragan'!

Rekantaĵo: Kune do ktp.

Malnobla baldaŭ mond' pereos,  
For la tiranoj kaj perfort'!  
Ni mem la novan vivon kreos,  
En kiu regos nova ord'!  
En kiu regos nova ord'!

Rekantaĵo: Kune do ktp.

## Piednotoj

1. ↑ B o l e s l a v o Ĉ e r v i e n s k i pola laborista poeto, aŭtoro de la “Ruĝa Standardo“. Naskiĝis en la jaro 1851 en Leopolo (Lvóv). Post finado de siaj universitataj studoj je la filozofa fako li partoprenis en la unuaj laboristaj organizaĵoj de estinta Orienta “Galicio“ — laboradis kiel redaktoro en progresemaĵ kaj social. gazetoj tiutempaj kaj mortis en la jaro 1885. Lia verkaro ne estas ampleksa, sed profunde revolucia.

La unua poeziaĵ-kolekto sia eliris en la jaro 1881. En 1870 oni ludis en Krakova kaj Leopola teatro lian tragedion “La Sklavo“. En 1881 li presigis “La Ruĝan Standardon“, kiu balde estiĝis la ĉefa himno revolucia de pola proletariaro, kaj en la jaro 1882 li publikigis sian lastan pli grandan poeziaĵon: “La Morto de Jan Hlasko“.

Oni devas rimarki, ke la disvastigo de l’ teksto de la “Ruĝa Standardo“ estis baldaŭ malpermesita de la estinta aŭstria registaro, ĝis fine la interpelado parlamenta de socialista deputito I. Daszynski en la jaro 1900 liberigis la himnon de “neleĝeco“.

Esp. resumo Jan Zawada, Lublin, Zamojska 10, Polio (S.A.T. 910).

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 12. Al barikadoj!...

Pola

Al barikadoj, laboristaro!  
Standardon ruĝan eklevu ni!  
Brave ni staru en la batalo,  
Ĉar venkos fine revoluci’.

Glavojn do  
Forĝu ni!  
El la fer’  
Purpura ŝprucas er’.  
Ĝi per fervor’  
Ardas en kor’!  
Al batal’!  
:!: Jam vokas nin signal’! :!:

Hej! kavaliroj de la laboro!  
Jam ektriumfu revoluci’!  
Al barikadoj! jam venis horo,  
Apelo sonas de l’ histori’!  
Glavojn do ktp.

Ĉiu fratino instigu fraton  
Batali brave en la danĝer’  
Por liberigi ekspluataton,

Oferi vivon pro la afer'.  
Glavojn do ktp.

Glor' al Lassal'o, al Marx honoro,  
Al laborista popolo glor'!  
Kune leviĝu ni al laboro  
Portadi lumon por la popol'.  
Glavojn do ktp.

For de l' popolo kalumniistojn,  
Popoltrompantajn pastraĉojn for!  
For la sinjorojn kapitalistojn,  
Ekspluatantojn de l' sanglabor'!  
Glavojn do ktp.

Flirtas standardo sur barikado,  
Insigno ruĝa de nia lig'!  
Al barikadoj, rapidu frato,  
Jam proksimiĝas la malamik'!  
Glavojn do ktp.

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala

enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

### 13. Kanto de libera spirito (Pola himno revolucia)

Aŭtoro de la originalo nekonata (unu el multnombraj malliberuloj sub cara reĝimo). Kompiltrad. de M. Arco-I. Lejzerovicz. Harmonizo por 4 viraj voĉoj de W. Tyszkowski, Ĥorgvidanto de la Lublina Lab. Koop. Societo.

Furiu, tiranoj, mortigu en rond',  
Tintadu katenoj, sklaviĝu la mond'!  
Liberaj ni estas — kun ĉeno sur manoj,  
Je hont', je hont' al vi, ho tiranoj!

Kaj kvankam malfortaj kliniĝas ĝis ter',  
Malglore subiĝas en ĉiu danĝer',  
Liberaj ne timas la ĉenojn sur manoj —  
Je hont', je hont' al vi, ho tiranoj!

Je pen' kondamnita kaj sanga labor',  
Riĉaĵojn pretigas por vi la popol',  
Kaj por ĝin blindigi — jen ĉenoj sur manoj,  
Ĉar tim', ĉar tim' al vi, ho tiranoj!

La brutaj perforto en sanga avid'  
Malfortan senpune turmentas kun rid',  
Liberan ne ĉenas katenoj sur manoj,  
Je tim', je tim' al vi, ho tiranoj!

Kaj kvankam la muroj fortegaj sen lim',  
Vi jam maltrankvilas kaj kreskas la tim',  
Spiriton ne povas vi ĉeni sur manoj,  
Je hont' kaj tim' al vi, ho tiranoj!

Per sang' estingata ekbrilas maten',  
Kun fort' disrompata ekgrincas katen' —  
Kaj falos karceroj, la ĉenoj de l' manoj,  
Je mort', je mort' al vi, ho tiranoj!



## 14. Forĝistoj ni...

Kanto de l' Sovetia komjunularo  
Rusa

Forĝistoj ni, amik' martelo,  
Feliĉ-ŝlosilojn forĝas ni.  
Leviĝu peza, la martelo,  
En ŝtalan bruston frapu, frapu, frapu vi!

Kun ĉiu frapo de la martelo  
Disfalas prem', fortiĝas ni  
Kaj sur kamparoj de la tero  
Popol' premata levas, levas, levas sin.

Forĝistoj ni de l' novsocio,  
Plej bonon nur deziras ni,  
Ne vana estos peno nia,  
Do per martelo frapu, frapu, frapu ni!

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala

enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 15. La Batalo ("A Batalha")

### Portugala

Revolucia himno dediĉita al la ĵurnalo "A Batalha" — ĉiutaga voĉportilo de la portugala laborista organizacio.

Muziko de la muzikverkisto *Tomás del Negro*

Versaĵo de *Joao Black*

Esperantigis K.do *Costa Junior* (S.A.T.-ano n.o 1635)

Al ni jen venas tago liberiga  
De la popolo ĉiam militanta.  
Vekiĝu, sklavo, estas ĝi instiga,  
Atentu, ne plu estu pripensanta.  
Sklavigajn leĝojn nepre vi detruu;  
La mastron nun forpelu tuj de vi;  
La homoj egalecon ĉiuj ĝuu.  
La mondon ŝanĝu, estu famili'.  
Ĥoro:

Konstante parazitojn ni batalu;  
Terposedeco inter homoj falu.

Sub la sklavec' kruela elportita  
Vi laboregas je l' mizer' terura,  
Kaj dume de sur via frunto ŝvita  
Al mastro venas la riĉec' plezura.

Jam estas tempo por la laŭta kri'  
Al la kaŭzinto de l' sufero ĉia:  
La teron ja heredis ĉiuj ni;  
Laboru ankaŭ vi, jen devo via.

ĥoro:

Konstante parazitojn ni batalu;  
Terposedeco inter homoj falu.

La teron jam tremigas lukt' intima  
Soifa de justeco kaj libero.  
Milito post milito nur plenkrima  
Alportas la liberon al la tero.  
La lumon de l'estont' salutu ni,  
Boniga direktil' de l'batalantoj,  
Produkti al homar' ordonas ĝi;  
Nur manĝos sur la ter' la produktantoj.

ĥoro:

Konstante parazitojn ni batalu;  
Terposedeco inter homoj falu.

## 16. La marŝo de la junularo

(Sveda)

Paroloj de *K. G. Ossiannilsson*.

Muziko de *Auguste Blanche*.

En arme' de l' labor' kaj en la vic' de l' junul'  
Sub la ruĝa standard' iru ĉiu laborul'.  
En la koro vi sentu liberecon por vi,  
Jen la anaro de l' liber', kaj la junaj estas ni.  
Do antaŭen dum kant' kaj per kurad' je la signal',  
Liberiga batal' por nova temp', ideal'.  
Pro venteg', en printemp' rompiĝas vintra la glaci'  
Brilas sun', sonas kant', la katenojn rompas ni.

Iras ni al batal' por ĉies plena justec',  
Liberigu do nin je la tuta facilec'.  
Staras dom' de l' perfort' sur fundamen' kiel mont',  
Unuiĝo, nia fort' forlevos ĝin por la estont'.  
For ĝin nun for ĝis rub' kaj super ties ruinar'  
Plugos ni sur kampar', novkonstruiĝos domar'.  
For do ĝin en honesta finbatal' por nia sort',  
Liberec' regos jam, ĉesis kruda la perfort'.

Nia bat' por popol' kaj por fratec' en la land'  
Estas por la forig' de la perfortema band'.

La ekbril', nia lum', vidiĝas ver' en klarec',  
Ŝirmas ni la niajn vivojn kontraŭ raba barbarec'.  
Tiun teron, de ni, kontentaj, rabis profitul',  
Plugis ni suferul', kulturadis malriĉul'.  
Al batal' por la rajt' ni iru viroj de l' liber'!  
Mondon jam de l' rabist' prenu ni per rekonker'!

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

Itala

## 17. La Ruĝa Gvardio (Himno)

Muziknotoj de *Vianigo Gibinetti* — Vortoj de *Spartacus*.

Tiun kanton marŝante kantis la italia junularo, kies kvazaŭa milita kanto ĝi estis.

Jen, tra la mond' iras stranga soldato,  
Paŝas antaŭen sen rajdĉeval',  
Kala la man', vizaĝ' sen kompatato,  
Gloro, hardita hero' de l' batal'.  
Sen plumaj faskoj, galon' orita,  
Sed sur la ĉapo skulptitan, en kor',  
Martelfalĉilon li montras krucitajn,  
Kiel emblemojn de la labor'!  
Vivu Lenin!<sup>[1]</sup>

Estas la Ruĝ-armeo,  
Kiu marŝas por rekreo  
Kaj ekskuas el tranĉeo  
Homaron en sklavec'!

Kuŝas ĉenita popol' malkuraĝa,  
Sub de la riĉa sinjoro spron',  
Post la teror' miljara sovaĝa,  
Fine ŝanĝiĝas l' azen' en leon',  
Furioze ŝiras kronit-suĉulon,  
De nabab'<sup>[2]</sup> prenas ŝtelaĵon da or',

Kondamnas lin neniam-laborulon  
Al pro malsat' deviga labor'!  
Vivu Lenin!

Estas la Ruĝ-armeo ktp.

Vidu, sub ruĝan la flagon alfluas  
Tuta proleta amas' en ord',  
Paŝoj de l' band' grandega brubruas  
Sur la tombejo de l' mondo je mort'.  
Mortintoj vane revivi provas;  
Ĉu taŭgas lukti do kontraŭ destin'?  
Pli ardaj, fortaj sub suno sin movas  
Militistaro de Lenin!  
Vivu Lenin!

Estas la Ruĝ-armeo ktp.

Kiam ripozas popol' dum nokthoro  
En granda urbo, en kampa rond',  
Ne plu maltrankviligas teroro  
De la vampiro — sensangigont'.  
Ĉar ĉiam gardas pri ĉia libero  
Kun sindonemo la Ruĝa gvardi',  
Ne plu revenos kun kruda severo  
De la gangren-burĝar' tirani'.  
Vivu Lenin!

Ĉar jen la Ruĝ-armeo  
Ĝin jam najlis al pereo



Dum revenko epopea  
De nova la homar’.

© ™ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

1. ↑ La ekkrio: Vivu Lenin! ne estas kantata, sed ritme parolata dum paŭzeto de la muziko antaŭ la rekantaĵo.
2. ↑ nababo = riĉa posedanto, parazito.

18. La juna gvardio  
Himno de la junaj komunistoj.  
(Melodio sama kiel [n.ro 10](#))

Antaŭen, kamaradoj,  
Renkonte al aŭror'!  
Per kugloj kaj grenadoj,  
Ni barojn puŝos for!  
Kuraĝe tenu ni en star'  
Standardon de la junular'.  
Gvardio juna estas ni de la laboristar'!

Ja peze nin turmentis  
Labor' de l' juga spec'.  
Junecon ni ne sentis  
Sub premo de sklavec',  
En la animoj portis ni  
katenojn de la tirani'.  
Gvardio juna estas ni de la laboristar'!

Kaj, fluigante ŝviton  
En la laborinsist',  
Liveris ni profiton

Al la kapitalist'.  
Sed tiu malliber' en fin'  
Al la batal' instigis nin.  
Gvardio juna estas ni de la laboristar'!

Ni levas la standardon  
Kaj vokas kun fervor':  
Aliĝu avangardon  
De l' regno de l' labor',  
Por regu la Laboro nun  
Kaj ĉiuj vivu en komun'!  
Gvardio juna estas ni de la laboristar'!

El la rusa trad. *N. Nekrasov.*

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 19. Al la Sennaciularo [\[1\]](#)

Muziko de Fritz Bunge  
(originalo)

Salutas fratojn la Satano  
Trans mar', trans ĉiu landa rand',  
:! Jen nia kamarada mano,  
Jen ruĝa nia flagruband'! :!

Saluton al vi kuniĝemaj  
En nova lingva komunec',  
:! Al ĉiuj vere ribelemaj  
Por sen- kaj eksternaciec'! :!

Malnovajn, vantajn la kutimojn  
Ni lasu al filistra kor'  
:! Por ni la mond' ne havas :  
Por ni popolo de l' labor'. :!

Rompiĝas pala tradicio,  
Respektigata de l' lacul',  
:! En la rigard' al Sennacio  
Rompiĝas de l' pasint' regul'. :!

Ekscite naciismo ondas,  
La morton antaŭsentas ĝi,  
:! Sur putriĝanta ni jam fondas  
Socion de la Sennaci'. :!

Ankoraŭ regas anarkio,  
Ankoraŭ regas nin tiran',  
:! Sed en rigard' al Sennacio  
Sin armas por batal' Satan'. :!

Kaj trompas la pastrar' malnobla  
Por malverema eklezi', —  
:! Stariĝu ni, popol' multobla,  
Por liberpenso kaj raci'! :!

Heroa estu la batalo,  
Jam multobliĝu nia fort'!  
:! Por alta nia idealo  
Ofer' ne granda estas mort'. :!

Agemon vekas celkonscio,  
Progresas mond' per nia far',  
:! La venkon de la Sennacio  
Ja garantias Satanar'. :!

*N. Barthelmess.*

# Piednotoj

1. [↑](#) Kantante oni ripetu la du lastajn liniojn de ĉiu verso.

## 20. Gejunulara ĵurkanto

Ne plu migru en mallumo,  
Ĉesu vagi en sensenc',  
Al batal' antaŭen, fratoj,  
Glav' kaj lum' — via potenc'!

Vin ne regu malespero,  
Ĝin forŝiru el l' anim',  
L' soci-lukt' ne vana estos —  
Al batal', fratar', sen tim'!

Hej, eklumos nova suno  
Radionta tra l' tut-ter',  
Nur ĝis tiam ni persistu  
En barakto por la ver'!

Junular', vin ne timigu  
Ŝtonaj baroj kaj eĉ ĉen',  
Multan sangon ni elverŝos  
Ĝis ekestos mond' de ben'!

El juda lingvo: *I. Jurysta.*

© ™ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**



## A) BATALKANTOJ

### 21. Kanto de Varsovia Laboristaro

(Varŝavjanka)

Aŭtoro: *Waclaw Swiecicki*

Nian standardon ni levos kuraĝaj,  
Kvankam minaca venteg' furiozas,  
Kvankam nin premas nun fortoj sovaĝaj,  
Kvankam neniu morgaŭon supozas.  
Ĉar tio estas la kant' de l' libero,  
Sankta standardo de la renaskiĝo,  
Estas triumf' de l' laboro kaj vero,  
Estas aŭror' de l' tutmonda fratiĝo.

Marŝu, Varŝavo, <sup>[1]</sup>

Al lukto brava,

Sanga kaj prava,

Marŝu, Varŝavo!

Nun, kiam mortas pro granda malsato  
Laboristaro, dronante en ŝlimo,  
Estas hontego al degenerato,  
Kiu la morteŝafodon ektimos!  
La oferita pro nobla ideo  
Restos senfrukta pereo nenia:

Kvankam al multaj minacas pereo,  
La estonteco ja estas nur nia!  
Marŝu, Varŝavo... ktp.

Hura!... De l' reĝoj forigu ni kronojn,  
Ĉar la popolo la dornan surhavas;  
Kaj ni detruu putrintajn jam tronojn,  
Kiuj en sango popola sin lavas.  
Venĝon teruran pro la ekspluatoj  
Al la suĉantoj de l' sango — laŭ deco!...  
Venĝon teruran al la plutokratoj,  
Venu rikolto de la estonteco!...  
Marŝu, Varŝavo... ktp.

El la pola trad. *N. Nekrasov.*

## Piednotoj

1. ↑ La sennaciularo kantu la rekantaĵon jene:  
Marŝ', kamaradoj,  
Pro l' idealo!  
Al sangbatalo,  
Marŝ', Kamarado!

© ™ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

22. Kanto de Lodz'a<sup>[1]</sup> laboristaro (Lodzjanka)  
(melodio sama kiel [n.o 21](#))

Alte leviĝu nia standardo,  
Florojn ni metu sur la tempi'!  
Plenaj de kredo, forto kaj ardo  
Al mortbatalo leviĝis ni.  
Jen finbatalo pro la libero!  
Standardo ruĝa — de fratoj sang',  
Vojo penega — mort' kaj sufero,  
En brusto sentoj — da fajr' lavang'.  
Hej, Lodzanaro! per sangomaro  
Falintojn venĝi jam venis hor'!  
Kune leviĝu, laboristaro,  
Jam pro libero batali hor'!

Kiam nin premas tiaj Ŝajbler'oj<sup>[2]</sup>  
Kaj ĉiu majstro — provokator',  
Kiam policon vokas Gajer'oj  
Por malsatantojn peladi for,  
Se kun Kaznakow<sup>[3]</sup> Poznanski<sup>[2]</sup> premas,  
Se vipas kune frost' kaj malsat',

Se pro ideo kune pereas  
Patro, fratino, filo kaj frat' —  
Hej, Lodzanaro! per sangomaro  
Disrompu ĉenojn de la popol';  
Kune leviĝu, laboristaro:  
Falintojn venĝi jam venis hor'!

Se multaj anoj el nia aro  
Mortis en turmoj<sup>[4]</sup>, en Siberi' —  
Nova leviĝu batalantaro,  
Eksonu vok' de l' revoluci'!  
Pro la falintoj en mortbatalo,  
Ofendoj, kiujn suferis ni,  
Venĝon ni ĵuru — kaj kvazaŭ maro —  
For superforton el histori'!  
Hej! Lodzanaro! per sangomaro  
Falintojn venĝi jam venis hor',  
Kune leviĝu, laboristaro,  
Ĉar estas tempo... jam venis hor'!

*Zygmunt Ból* (Zigismondo Doloro)

## Piednotoj

1. ↑ Lodz — granda urbo teksindustria, 500 000 enloĝantoj (t. n. “pola Manchester“). “Lodzjanka“ estis kantata en 1905 dum revolucio.
2. ↑ [2.02.1](#) Ŝajbler k. Poznanski — du tiam plejgravaj lodzaj fabrikposedantoj.
3. ↑ Kaznakov — rusa urbestro-policisto, fama pro siaj kruelaĵoj.
4. ↑ Rusa Karcero (tjurma).

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

23. „Ventegoj hurlu ĉirkaŭ ni“  
Pola

Ventegoj hurlu ĉirkaŭ ni —  
Ni iras kun espero.  
En juna varm', en sunradi'  
Degelas la sufero.  
Rek.: Antaŭen iras ni  
Al lum', al sunradi'!

Haltigos nin nenia fort',  
Nek limojn al ni metos;  
Eĉ al la potenculo-mort'  
Ni vivu-krion ĵetos.  
Rek.: Antaŭen iras ni  
Al lum', al sunradi'!

Al novaj mondoj iras ni  
Por ĝui vivon junan,  
Kuraĝa nia la gvardi'  
Konkeros landon sunan.  
Rek.: Antaŭen iras ni  
Al lum', al sunradi'!

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**



## 24. Popolvolana himno

Rusa

(Narodnaja Volja-partia himno)<sup>[1]</sup>

Fratoj, kuraĝon ne perdu  
En la batala danĝer',  
Landon — patrinon defendu  
Pro la honor' kaj liber'!

Se jam perej ni devos  
En luktoj kun tirani'  
Eĥon de l' ago eklevos  
Viva la generaci',  
Viva la generaci'!

Ili nin murdu, turmentu,  
Tenu ĝis mort' en karcer',  
En la minejojn forsendu,  
Premu per ĉia sufer'.

Rekantaĵo

Ĝemas premite kaj plendas  
Plore la proletari',  
Manojn al ni li etendas,  
Helpon atendas de ni!

## Rekantaĵo

Mond' renaskita ekfloros,  
Havos liberon homar';  
Bene ĝi nin rememoros,  
Venos al nia tombar'.

Do se perei ni devos  
En luktoj kun tirani'  
Eĥon de l' ago eklevos  
Viva la generaci'!

## Piednotoj

1. [↑](#) La kanto estas je honoro de S o f i o P e r o v s k a j a partoprenintino de la komploto kontraŭ caro Aleksandro IIa. — Pendigita 1881. —

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 25. „Dubinuška“

Rusa

Degeyter kaj Pottier

Multajn kantojn mi aŭdis en mia patruj’.  
Ili ĉiuj malĝojon entenas,  
Sed nur unu mi bone memoras eĉ tuj, —  
Ĝi al laboristar’ apartenas.

Hej, vi, kara bastonego!  
Hej, vi, verda, potencega!  
Ni tiru, ni tiru kun forto!

Kaj de avoj al patroj, al la posteul’  
Ĝi transiras jam kvazaŭ heredo,  
Kaj dum la malfeliĉ’ por popol’-mizerul’  
Estas ĝi plej fidela rimedo.

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

Oni diras, labori ne ŝatas muĝik’,  
Decas lin per punbatoj instigi,  
Nu do, kiel forgesi pri kara muzik’,  
Pri bastono la kanton ĉesigi?

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

Jen la anglo-ruzul', por helpad' al labor'  
La maŝinojn perfektajn eltrovas,  
Sed la rusa popol', kiam fort' estas for,  
Pri bastono ja kanti nur povas.

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

Tiras barkon kun lign' aŭ dum forĝo de l' fer'  
Siberian minaĵon trovante,  
Solan kanton ni kantas kun kora sufer'  
La bastonon en ĝi renomante.

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

Dum sur-Volga labor' en la sabl' kun dolor'  
La piedojn kaj dorsojn rompante,  
Ni forĝegas suferon en ŝarĝa labor'  
Pri la kara bastono kantante.

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

Nin turmentas batad' kaj katena premad'  
Sur la dorso — viv' plensuferega.  
Kaj konsolas nin nur la malgaja kantad'  
Pri bastono por ĉiuj karega.

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

Sed vekiĝos popol': lia dorso kaj kol'  
Estos post la batad' rektigitaj,  
Kaj per forta bastono laŭ lia justvol'  
Estos jam malamikoj batitaj.

Hej, vi, kara bastonego!... ktp.

El la rusa trad. *Birjukov*.

© ™ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

26. Kremla Sonorado  
Poemo de *Aleksandro Sati*  
Rusa (post 1917)

Melodio: “Salut glacies sublimez!”

Al Okcident’ el Moskvo flugas sonorila kant’,  
ĝi portas pri la mort’ signalon al riĉula band’.

:|: Per flama lang’  
pri nia sang’  
sonoru Kremla kant’!  
Ĝi flugu trans la valo, mont’,  
ke brulu tuta mond’,  
ke brulu tuta granda mond’! :|:

Ho flugu, mia kanto tra ferkradoj de karcer’,  
miksiĝu kun proletariaj ĝemoj kaj sufer’!  
(Rekantaĵo)

Al tiu kant’ resonas eĥo ĉe laboristar’,  
ĝi estos preĝo en la buŝoj de la infanar’.  
(Rekantaĵo)



## 27. Redonu mian monon!

El angla kantaro de I. W. W. tradukis *Novulo*

Melodio angla

La kapitalistoj nun ĉie  
Rabadas la monon ĉe ni,  
La kapitalistoj nun ĉie  
Rabadas la monon de mi

(Ĥoro)

Mian monon, ili redonu al mi, al mi;  
Mian monon, ho! devos redoni al mi!

Ja tuta la laboristaro  
En iu ajn parto de l' mond'  
Suferas pro sama mizero:  
Ĉu estas ne granda do hont'? (Ĥoro.)

Ke mortis la kapitalistoj,  
Lastnokte mi sonĝis kun mir'  
Kaj lasis por gelaboristoj



Riĉaĵojn laŭ ĉies dezir'. (Ĥoro.)

Batalu, amikoj trans maro!

Batalu, amikoj ĉe ni!

Por bono de l' laboristaro

Reprenu la monon por ni! (Ĥoro.)

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 28. Kanto kontraŭmilitarista

Holanda

Milito al milito, fratoj.  
Sangverŝo okazu ne plu.  
Rifuzu esti ni soldatoj,  
Kazernon eniru ne plu.

L' armilojn sangajn vi forĵetu,  
For la signojn de perfort',  
L' uniformon hontan tuj demetu,  
Kun ĉiuj iloj de la mort'!

Rekantajo:

L' armilojn for de nun, soldatoj!  
Pulvon semu sur venton, fratoj!  
Kanon' ne sin aŭdigu plu —  
For sanga gloro de la soldatoj.  
:! Rompu sabrojn sur la genu'  
Disiru, regimentoj, vi!

De nun ni ne plu volas lerni  
La arton hontindan de l' ŝtal'.  
Translimajn homojn — niajn fratojn —  
Mortigu ni ilin? Kial?

Ne plu ni lasas nin konduki  
Al buĉejo laŭ ies plaĉ'!  
Ni abomenas sangan gloron —  
Soldatoj estas ni de l' pac'!

W. N.

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 29. Fil' de l' labor'...

Sveda.

Marŝkanto.

Fil' de l' labor', kolektiĝu ni ĉiuj  
Al niaj fratoj en sud' kaj en nord'!  
Ĉu vi ne aŭdas sonegon de tiuj  
Vortoj liberaj de bordo al bord'?

For el mallumo,  
Sklavego la tag',  
Iru al gloro  
Honora la ag'!

Juĝ', kun surskribo: "vi preĝu, laboru!"  
Tenis ja nin en mallum' kaj mizer';  
! : Homa indec' nin protekte favoru,  
Justo kaj pano kaj viv' en liber' !:

Ne la naturo maldolĉe disigis  
Riĉan, malriĉan per akra la lim';  
Forto senkora en mondon enigis  
Senegalecon per rabo kaj krim'.

Pistu en polvo  
Bovidon el or’;  
Flame batalu  
Kun plena la kor’!

Brave premantojn ni ĵetos al tero  
— Krion batalan laŭtigas la mond’ —  
! Estu konsent’ kaj kuraĝ’ nia pero  
Sub la standard’ de l’ venkonta fratrond’ !:

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

### 30. — Revolucio

Franca

Himno al Revolucio

*De Robert Guérard*

Ribelu vi! proletoj de uzinoj  
Postulu l' frukton de via labor',  
Estu por vi la iloj kaj maŝinoj,  
Ĉe gajn' egalu kiel ĉe dolor'.  
Ĉar penas brakoj kaj la cerboj viaj,  
La feliĉec' ebligas sur la ter'  
Ne krii plu al la barantoj ĝiaj  
La baron for! feliĉ' iros sen per'.

Revoluci'! por ke la mond'  
De egaleco estu rond'.  
Revoluci'! por ĵeti for  
La tutan kaŭzon de l' dolor'.  
Revoluci'! por ke el sciencoj  
Pacigaj venu la potencoj,  
Per la agad' kaj la raci'  
Stariĝu ni! Revoluci'!

Ribelu vi! kampuloj tro cedemaj  
Por la akir' de l' kulturata ter',

Ne estu plu progreson evitemaj  
Por vi, por ni, ĝin gardu de danĝer'.  
Forprenu de la akaparistaro  
La teron por ke estu ĉies ĝi,  
Laboru ĝin vi la senpanularo  
Al nia pen' kunigu vian vi.

Rekantaĵo

Ribelu vi! soldatoj la amasoj  
Disbatu estrojn de la ŝovinism',  
Ne estu plu la disigil' de rasoj  
ĵetanta sange ilin al abism'.  
Pripensu, vi batalas kontraŭ savo  
La via, dum strikantojn venkas vi,  
Ne estu plu viktim' de via glavo  
Armilojn for! fratar' venu al ni.

Rekantaĵo

Ribelu vi! filinoj kaj patrinoj  
Ne estu plu viando por plezur',  
Ne nasku plu idaron sen inklinoj  
Ĉar de l' infan' dependas la futur'.  
La hom' sur ter' ne via mastro estu  
Ne estas rajt' por devigadi vin,  
Do en liber' vi vivu, sed vi restu  
Plenaj de am', plibonigontaj nin.

Rekantaĵo

Ribelu vi! ignoraj kredemuloj  
Venu al lum' ĉar vin blindigis Di',  
Per nia torĉ' revidu la okuloj  
Por evitad' de l' nigra eklezi'.  
Mensogon devas venki vero ĉian  
En libr' de l' ver' lernadu kun fervor',  
Tuj kiam vi kleriĝos, songon vian  
Forpuŝos am', ĝi malaperos for.

Rekantaĵo

Ribelu vi! entute suferhomoj  
La ŝtelitar', la senheredular'  
Kunigu vin por la akir' de domoj  
Bienoj kaj de tuta la rajtar'.  
Tre grandaj kredas vi ĉiujn sinjorojn  
Ĉar la erar' kaj tim' subigas vin,  
Ĉar al tiran' oferas vi la korojn  
Ekstaru jam! superos vi en fin'.

Rekantaĵo

El franca tradukis *Liber*.



© ™ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 31. Himno de la subpremitoj

*Angelo Tonello*<sup>[1]</sup>

Muziko de *Fritz Bunge*<sup>[2]</sup>

Itala

Leviĝu, leviĝu, nesciantaj ĉifonuloj,  
Subpremitaj por longa tempo kaj peniga labor’;  
Antaŭ la grandega furiozo de la sklavuloj,  
Ne regas malsaĝa potenco de la or’.  
    Eliru ĉifonuloj viajn malsekajn ruinojn,  
    Alarmo forkuru, flugu al la batal’;  
    Ili ŝtelas vian panon kaj insidas viajn virinojn,  
    Detronigi la fiburĝojn alvokas nin signal’.

Estas niaj la belegaj palacoj orumitaj,  
Ti-kie mallaboras la riĉularo;  
La kampoj banataj de niaj ŝvitoj,  
Estas niaj, kaj nia estas la rikolto de l’ kamparo.  
    Rekantaĵo

El miloj forlasitaj, furiozaj ekscitemuloj,  
Al la suno malfaldu la ruĝan flagon;  
Estas pli bone fali kiel fortuloj,

Ol la frunton kurbigi en sklavema ago.

Rekantaĵo

Kuraĝu, kamaradoj, la tagoj atendataj,  
De la koler' haltigitaj, malproksime ne estas;  
En la blindaj dometoj ni mortiĝas malsataj,  
En mezo de la reĝejo la reĝoj festas!

Rekantaĵo

El nestoj malsekaj, el malpuraj kabanaj,  
La sankta kanajlo jam kuras al la batalo;  
Estas dekoj, centoj kaj miloj da domaĉanoj,  
Kiu levigis svingante per la ŝtalo.

Rekantaĵo

Esp.igis *G. Merlini*.

## Piednotoj

1. ↑ (Naskiĝis en Fontanelle d' Oderzo-Treviso. Li estis didaktika direktoro. Starigis kaj direktis kelkajn ĵurnalojn de socialista propagando. Vigla parolanto popola; ĵurnalista batemulo.)

2. [↑](#) Originala muziko itala nericevebla; tial novkomponita por nia Kantaro de nia SAT-komponisto.

## 32. El la kampanaro milito 1525 Germana.

Ni estas Gejerano nigra bando, heja oho!  
Tiranojn forbatos ni el lando, heja oho!  
Al atako, el bivako,  
Ruĝano kokono metu ĉe la monako.

Ni volas ĉe la Disinjoro plendi, kirielejo,  
Ke ni pastraco povu mortfendi, kirielejo.  
Al atako ktp.

Dum Ejo laboradis kaj Adamo, kirielejo,  
Nobelo kie estis do tiam? kirielejo.  
Al atako ktp.

Nun abatejojn trafu pesto, heja oho!  
Ni sekvas nur al Manifesto, heja oho!  
Al atako ktp.

Nin Florjano Gejer por repago  
Gvidas al ago.  
Kun "ligŝu" sur lia flago,  
Kiras kaj kasko en la.  
Al atako ktp.

Ĝc Weinsberg brul' kaj rab' okazis, heja oho!  
Tre multaj siajn vivojn lasis, heja oho!  
Al atak' ktp.

Filidon nobelan ni sen per', heja oho'  
Abismen sendis al infer', heja oho!  
Al atak' ktp.

Venkitaj iras ni hejmen je fin', heja oho!  
Pli bone nepoj finos ĝin, heja oho!  
Al atak' ktp.

Trad. N. B.

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## B) MALLIBEREJO, FUNEBRO, LIRIKO

### 33. Funebra marŝo (de la rusa revolucio)

Rusa

Viktime vi falis en kruda batal',  
Pro am' al popol' en sindono.  
Vi ĉion fordonis pro ĝia liber',  
Pro vivo, honoro kaj bono.  
Vi ofte suferis en malliberej'!...  
Verdikton maljustan sen ĝenoj  
Juĝistoj — vampiroj dediĉis al vi:  
“Vi iros, sonante per ĉenoj“.

Vi iras lacega, sonoras katen';  
Kun manoj, piedoj ĉenita  
Trankvile — malĝoje rigardas jen vi  
Antaŭen tra vojo ŝtonita.  
Varmiĝis la ĉenoj pro suna varmeg',  
En karnon eniĝis la fero,  
Kaj gutas el vundoj, kaŭzitaĵ de ĝi,  
La sango varmega al tero...

Sed portas katenojn vi kun silentad',

Pro kara afer' vi suferas,  
Pro ke vi ne povas kun indiferent'  
Rigardi, ke frato mizeras.  
En via anim' vivas sankta la kred',  
Ke vero la ŝtalon superas,  
Ke venos la hor' de respekto al sang',  
Vi kiun pro frato oferas.

Pereon sentante, en ora palac'  
Festene diboças tirano,  
Sed signojn minacajn delonge sur mur'  
Desegnas fatala jam mano,  
Pereos la jugo, leviĝos popol'  
Grandega, potenca, libera!  
Adiaŭ do, fratoj, vi iris kun nobl'  
Tra l' vojo honesta, fiera.

El la rusa trad. *E. Miĥalski*



## 34. Kanto de Siberiaj ekzilitoj

Ĉu vi plendas pri liber', — pri liber' — pri liber'?

Ĉu malbone en karcer', — en karcer', —

Do?

Ja palacon havas ni —

Lit', tableto kaj neni'

Plu!

Ja ni manĝas kun efik' —

Pano, akvo kaj brasik'

Jen!

Kaj neniŭ rabos nin:

Oni gardas ja sen fin'

Nin!

Nur libero — mankas sol',

Sed ĉu havas ĝin popol' —

Ĉu?

Ĝis Tobolsko per etap'

Ni veturos kun kacap'<sup>[1]</sup>

Mem.

Skuas ĉaro kiel febr'

Intestaron ĝis vertebr'  
Eĉ!

Kaj Kamĉatkon kun facil'  
Trafos fine en ekzil'  
Ni.

En Kamĉatko sub la vip'  
Al ni venos emancip' —  
Mort'.


Ni leviĝos en aer'  
Kaj forfalos al infer'  
Jam.

Vivu la ide' sen mort'  
Kaj pereu la perfort'  
For!

El la pola trad. *N. Nekrasov.*

**Piednotoj**

1. [↑](#) kamparano — iom mokema nomo.

©  Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

35. Min kondamnu juĝantaro  
Kanto de malliberulo en la dramo “Dziady“

*Adam Mickiewicz*<sup>[1]</sup>

Pola

Min kondamnu juĝantaro  
Je minej', Sibir' terura —  
:!: Mi kun fidelec' subula  
Ĉiam penos por la caro. :!:

Disbatante per martelo  
La malmolan mineralon,  
:!: Pensos mi: el tiu fero  
Estos ja hakil' je caro. :!:


Prenos mi en kolonio  
Filineton de Tataro,  
:!: Eble el la familio  
Estos la Palén'<sup>[2]</sup> por caro. :!:

Mi traplugos en ĝardeno  
De la ter' malmolan sinon  
:!: Kaj mi ĉiujare semos  
Nur kanabon, nur la linon :!:

Estos el kanab' fadeno.  
La arĝenta fadenaro  
:!: Gloros eble pro posteno  
De rubando<sup>[3]</sup> por la caro. :!:

## Piednotoj

1. [↑](#) **A d a m M i c k i e v i ĉ**, plej granda poeto pola (\* 1798, † 1855). Liaj ĉefverkoj: “Sinjoro Tadeo” (traduko de A. Grabovski) kaj “Festo de praavoj”. La supra kanteto devenas el tiu lasta verko.
2. [↑](#) **Palén**, generalo rusa, partopreninto de komploto kontraŭ caro Paŭlo (j. 1801).
3. [↑](#) Caron Paŭlon oni sufokis per rubandoj.

©  Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 36. Katenmazuro<sup>[1]</sup>

Al mazuro iru kune  
La ribelularo!  
Dancu vigle, ĝoju nune  
Varsovi' kaj Karo<sup>[2]</sup>!

Kvankam manoj en katenoj  
Ne por ni teruro —  
Ni ĝojadas, ĉar katenoj  
Tintas per mazuro.

Balpalac' ja "tjurma"<sup>[3]</sup> estas  
Por belegaj festoj  
Kaj ornamoj — ruĝaj signoj<sup>[4]</sup>  
Kaj "katorgaj" vestoj.

En ĉi vestoj kaj palacoj  
Gaje ni festenas —  
Niajn pensojn, konsciencojn  
Zorgoj ne venenas.

Sentojn moro ne estingos  
Nek ilian varmon;  
En infer' junuloj ĝuas  
Tutan vivoĉarmon.

La knabinaj okuletoj  
Plenaj de espero  
Kaj ne rompos la koretojn  
Pleja eĉ sufero.

El buŝetoj ĉarmaj fluas  
Kantosonoj ĝoje —  
Ne videble, ke suferis  
Ili tiomfoje.

Eĉ se iun el anaro  
Murdos superforto —  
Malgravaĵo, ĉar ja ĉiun  
Fine venĝos sorto.

Kamaradoj venĝos morton  
De l' samideano  
Kaj sur lian tombon ĵetos  
Kapon de l' tirano.

Ĉenogrinc', armilsonoro  
Vigla jen mazuro;  
Je la sonoj kreskas koro,  
Ridas la okulo.

Kiam venos tag' de l' danco  
Niaj kazematoj  
Frapos takton de l' mazuro  
Per katen' je kradoj.

Tiel estos vigla, forta,  
Ke krevos ĉeneroj  
Kaj katenmazuron kantos  
Ĉiuj polaj teroj.

Tra la lando flugos sonoj  
Kvazaŭ al parado,  
Kun mazur' popol' ekstaros  
Sur la barikado.

Kiam ĉe la viglaj sonoj  
Oni rompos muron,  
Plej kuraĝaj gvidos tiam  
Blankan la mazuron<sup>[5]</sup>.

Malaperos tiam nuboj  
Kaj la friponaro,  
Tjurmoj, kradoj kaj katenoj,  
Sekvantar' de l' caro.

Ĉiu sian domon iros



Kaj pro la plezuro  
Al infanoj siaj kantos  
La katenmazuron!

*Ludoviko Waryński.*

## Piednotoj

1. ↑ Mazuro — danco de mazuroj (Mazovio — ĉirkaŭ Warszawa).
2. ↑ Karo — nomo de la katorgejo en Siberio (katorgo — punlaboroj).
3. ↑ “Tjurma” — ruse: malliberejo (laŭvorte: turo).
4. ↑ La katorganoj portis sur ŝultroj ruĝajn signojn.
5. ↑ Blanka mazuro — lasta danco antaŭ mateno.

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**  
**Traduko:**

37. En malliberejo<sup>[1]</sup>  
Kanto de Estonaj politarestitoj  
Melodio Estona<sup>[2]</sup>

Ni sidas post kradoj, en malliberej'  
Vidante nur ondojn en mar';  
Sed kuraĝigante nin al Batarej'<sup>[3]</sup>  
Kantadas liberon ondar'.

En ĉeloj mallumaj kun mortapati'  
Ni sidas pro nia ide'; —  
Perforte premataj de l' blank-reakci'  
Suferas teruron de ve'.

Sed pense ĉeestas ni landon de l' sun',  
En hejmo de l' plena liber'; —  
En mondo feliĉa, regata de l' bon' —  
For tute de tie ĉi — infer'.

Nin gardas konstante nun deĵorantar',  
Zorganta pri nia malag',  
Ke daŭru kaj regu pli longe burĝar'

Kaj iĝu neniam, la tag’.

Sed ondoj liberaj ribelas en mar’  
Plaŭdante potence al bord’;  
De ili ensonas tra l’ fera kradar’  
Al ni libereca akord’.

Ni sidas post kradoj, en malliberej’  
Vidante nur ondojn en mar’;  
Sed kuraĝigante nin al Batarej’  
Kantadas liberon ondar’.

## Piednotoj

1. ↑ Verkis R a i m o n d N e i t r i k , Oktobro 1921
2. ↑ Nericevebla.
3. ↑ “Batarej“ estas nomata Estona centra malliberejo kuŝanta sur bordo de maro en Revalo (🌐 [Talino](#) ).

38. Kanto de l' laboro  
Pola

Hej, fratoj! sonu nia kant',  
Vekiĝu la popol' gigant' —  
Eksonos ĝoja ĥor':  
Pereos malamik' — viper',  
Maten' ekbrilos de l' liber',  
Glor' al labor'!  
Glor' al labor'!

Ni kunbatalos pro l' afer',  
Ne vana estos la dangêr',  
Eksonos venka ĥor':  
Ke muroj falos jam en rond',  
Ke nia estos tuta mond'!  
Glor' al labor'!  
Glor' al labor'!

De sanga la popollabor'  
Ekspluatistoj iros for —  
En tiu venka hor' —  
Pereos ekspluatistar',  
Akiros rajtojn popolar'. —

Glor' al labor'!  
Glor' al labor'!

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 39. Maja Marŝo

Por Fortepiano

Per verdo kaj floroj printempaj vestita  
De l' maj' tag' unua alvenis;  
En ĉiuj terpartoj subite la voĉon  
Popoloceano ekprenis:

Hodiaŭ laboros neniŭ —  
Ni homan indecon akiru,  
Kaj tiun-ĉi tagon por festo elektu  
Kaj pezajn katenojn disŝiru.

Kaj la laboristo hodiaŭ nur ĝuas  
La vidon de l' suno radia,  
Do tagon dediĉas al ĝojo, amuzoj,  
Ĉar festo ja proletaria.

Hodiaŭ laboros neniŭ — ktp.

Hej, fratoj! Hodiaŭ serenu la fruntoj!  
Neniŭ el ni suferegu!  
Kaj ĝoje forflugu al ni la momentoj!  
Neniŭ hodiaŭ nin regu!

Hodiaŭ laboros neniŭ — ktp.

Silentas la radoj, ne muĝas maŝinoj —

Sur verdo ripozu ni gasta,  
La ĉarma naturo animon fortigu,  
Ĉar venas batalo jam lasta.  
Hodiaŭ laboros neniu — ktp.

La mondo malnova elstreĉas jam fortojn  
Kaj siajn fortigas altarojn,

Al nova aŭroro, potenca, terura  
Perforte starigas ĝi barojn.  
Hodiaŭ laboros neniu — ktp

Sur nia standardo ruĝiĝas signalo:  
Fratec, egaleco, libero!  
Unua de majo por ni ĉiam estu  
La tag' de l' popola afero!  
Hodiaŭ laboros neniu — ktp.

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**



**Traduko:**

40. Estingiĝis radi' de l' espero  
Pola

Estingiĝis radi' de l' espero!  
Antaŭ ol ekheliĝos la mondo,  
En fantoma leviĝu ni rondo  
En la sango estingi suferon.

Ne por ni la senaga vivado,  
Por ni ludu fulmtondr' en ĉielo,  
Ĝis la nubojn en fajrokaskado  
De la morto traflugos anĝelo.

Ja ne povas ni ami sincere,  
Kiam ĉio rampadas sen forto —  
Por plezuroj ni mortis surtere,  
Per tranĉilo ni vivas kaj morto.

Aŭ pli bone for armojn, tranĉilojn,  
Ni envias ja sorton al ili,  
Ni ja volas en sanga deziro  
Malamikojn mordadi kaj ŝiri.

Ni la hejmojn trankvilajn eniros,  
Kie homoj feliĉaj songadas,  
Nia kanto trankvilon disŝiros  
Ĝis la homoj kun ni ekvagados.

Se ne lumas radi' de l' espero,  
Antaŭ ol ekheliĝos la mondo,  
En fantoma leviĝu ni rondo  
En la sango estingi suferon.

*(M. Romanovski).*

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## 41. Filo de l' popolo<sup>[1]</sup>

Germana

Teksto kaj melodio de *H. Pfeil*

Lulil' mia staris en eta kaban',  
De l' zorgoj mi estis fidela ja an';  
Ĉar la aroganton ne konis la kor',  
Popolon mi amis en ĉiu ajn hor'.  
:|: Ĉu eĉ la zorgoj domon enrigardas :|:  
    Popola filo estas mi  
    Estas mi kaj restas.

Profunde en valo penega migrad'  
Al supro kondukis ne mia celad'.  
Mi restas por ĉiam homara la an',  
Orden-ornamaĵon rifuzas la man'.  
:|: Kien la viva barko min direktas :|:  
    Popola filo estas mi  
    Estas mi kaj restas.

Kaj fermos okul' mi al daŭra dormad'  
Kaj portos vi min al eterna restad'  
Ornamu la tombon per verda kronet',  
Stariĝu sur ĝi la memor-tabulet'  
:|: Kaj jen la vortoj sur ĝin enĉizitaj :|:

Popola filo estis li  
Estis li kaj restis!

Esperantigita de *P. Rauschenbach*

## Piednotoj

1. [↑](#) Funebra kanto kantata dum entombigo.

## 42. Tord Foleson

Norvega kanto de *Per Sivle*

Trankvile, sed forta ritmo.

G. Ad. Uthmann.

La tempo malnova kontraŭ nova en val'  
Norvega staris por mortbatal'.  
Jen la mortontoj kontraŭ nova la vivofort',  
Jen la kreskontoj kontraŭ putra perea sort'.  
La glavojn eltiris en sama la hor'  
Kuraĝa juna Olaf kaj maljuna griza Tor.  
Kaj eksonis la korn', ke bruegis la tero,  
Kaj siblis la sagoj kaj morttrafis fero.

Raportas la famo pri glora kuraĝul',  
Tord Foleson, Olaf'a standardul'.  
Pri tiu flagportanto oni kantos, raportos  
Dumdaŭre standardojn oni nur portos.  
Ĉar, kiam lin trafis mortiga la ŝtal',  
Li paŝis antaŭen al arda batal'  
Kaj la flagan stangon per lasta fort'  
Puŝis enteren, ĵus antaŭ la mort'.  
La legendo diras: Jen mortis li,  
Sed la standardo firme staris ĝi.  
Kaj tion la hom' por memoro ricevu:  
En batalo sanga la flagon li levu.

La viro falu, sed standard' staru firm',  
Samkiel Norvega Tord, libereca ŝirm'.  
Ja estas bonega, granda tera sort'  
Ke staras standard', spite homa mort'!

Trad. A. Sproeck.

© ⓘ Ĉi tiu verko estas traduko kaj havas alian statuson de kopirajto ol la aplikebla kopirajta protekto de la originala enhavo.

**Originalo:**

**Traduko:**

## C) MIKSITAJ KANTOJ

Sub tiu ĉi rubriko estas kunmetitaj multaj kantoj, kiuj apartenas al rubrikoj a) kaj b) aŭ eĉ sub 1a parto estas aperendaj. Sed pro malfrua ricevo de l' manuskriptoj (k. muziknotoj) ili estas metitaj al la fino.

### 43. Mallibereja

Ĉeka

Kantu nian kanton, fratoj,  
Ni, liberaj batalantoj,  
Spite la malliberej'!  
:!: La libera kanto, vorto,  
Sonas malgraŭ la perforto  
ankaŭ tra la turmentej'! :!:

En sufer' popol' malsatas,  
Kapitalo ekspluatas,  
Klopodon de laborist'!

:!: Tio ĝin ne kontentigos,  
Ĝis la ost' vin eksproprigos  
Kaj nenie la venĝist'! :!:



Supren, fratoj, man' en mano,  
Eĉ se venus uragano,  
Nia standard' ne falos!  
:!: Tuj sur nia tombo, fratoj,  
Kreskos novaj batalantoj,  
Ruĝa standard' leviĝos! :!:

Ruĝos super la homaro  
Kiele matenbrilaro  
Senlacega ribelist'.  
:!: Alten, pensoj! Sonu kordo!  
Por libera nova ordo  
Vivas, mortos laborist'! :!:

Esperantigis *Fjch.* – Orig. de *Norbert Zoula*<sup>[1]</sup>.

## Piednotoj

1. <sup>↑</sup> Kiam en jaro 1880 sekrete okazis unua kongreso de bohemslava sociala demokratio en malgranda gastejeto Svatá Markéta, kaŝita post bastionoj de Praha, partoprenis ĝin ankaŭ **N o r b e r t o Z o u l a**,

lignaĵisto, poste malliberigita. En malliberejo li verkis la poemon, tiel simplan kaj do tiel plenan da forto, espero kaj brulanta malamo al ekzistanta socia ordo, ke ĝi baldaŭ malgraŭ polica persekutado fariĝis batala kanto de bohemaj socialistoj. —

## 44. Laboristoj ekvekiĝu!

Vortoj de *Novulo*

Melodio slava.

Laboristoj ekvekiĝu ĉar ni manĝi devas  
Estas tempo ke sin ĉiu laboristo levas  
Kaj malfermas la okulojn kiel hom' konscia  
:!: Por forpeli la rabistojn de l' laboro nia :!:

La tiranoj faras leĝojn, kiuj nin premadas,  
Kaj pastraro ĉiutempe ilin nur helpadas,  
Tial restis ni, mizeraj, subigitaj homoj;  
:!: Nun forpelu ni rabistojn jam de niaj domoj :!:

Laboristoj ĉiuloke, penu nin fratigi,  
Ĉar ni devas fortojn niajn ĉiam unuigi,  
La homaron laborantan, ni mem liberigos,  
:!: Se tiranojn ni por ĉiam fine jam forigos :!:

## 45. Marŝo de l' anarkistoj

Ni kantu do fratoj dum tondro timigas,  
Dum forta eksplodo, dum fajr' ruinigas,  
Sub nigra standardo de l' granda batal!  
Alarmsonorado nun estu signal!

Detruu ni fratoj palacojn idolon,  
Disrompu katenojn, elmontru la volon,  
Sufiĉe nin mokis fripona la land'  
Popolan suferon dronigu en sang!

Vekiĝis, ribelis la vol' de l' popolo  
Pro l' ĝem' komunuma, pro l' vok' Ravaŝola.  
El ĝemoj naskiĝis potenca signal',  
Ĝi vokas senĉese al brava batal'.

Amikoj suferas en vasta Rusio,  
En bela Parizo kaj en Sibirio.  
Martiroj-amikoj nin vokas ĝis nun,  
Kaj al perfortuloj jam venas mortpun'.

Sennombre mortfalas en malliberejo.

Ho bela libero, ho ĝusta ideo,  
Sennombraj amikoj jam servis al vi.  
Pro la vero mortfalis en lukt' pro l' soci'.

Oni ripetas la unuan strofon. <sup>[1]</sup>

El rusa lingvo esperantigis

*A. Levandovsky.*

## Piednotoj

1. <sup>↑</sup> Notojn ni ne ricevis. — Eld.

## 46. Marŝo de la laboristoj en Esperanto

La melodio: [Fratoj, al sun' \(vidu n.o 3\)](#)

Fratoj, antaŭen sen timo  
Post kondukanta nin stel'  
Kun la esper' en animo  
Al forloganta nin cel'!

Estas ne longa la vojo,  
Kiu nun restas por ni:  
Baldaŭ ni vidos kun ĝojo  
Morton de la tirani'.

Ni suferadis sufiĉe,  
Sed nun finiĝis sufer',  
Kaj devas vivi feliĉe  
Ni posedantoj de l' ter'!

Estas ni ĉiuj popolo  
De l' sama tero — patrin',  
Kaj sama celo kaj volo  
Nun unuigas ja nin!

Ĉiuj ni volis liberon  
Por la proletariar'  
Kaj liberigi la teron  
De la burĝaro kaj car'!

Kaj plenumiĝis la volo  
De la proletariar':  
Reĝas de nun la popolo  
Kaj malaperis la car'!

Ĉie la burĝ-plutokratoj  
Estas en la agoni',  
Kaj ĉiulande la fratoj  
Manojn etendas al ni.

Marŝu do, fratoj, sen timo  
Post kondukanta nin stel'  
Kun la esper' en animo  
Al forloganta nin cel'!

*V. N. Devjatnin.*

## 47. La Ruĝa Regimento Varsovia

Melodio de „Rota”.

(Kanto de la polaj ruĝarmeanoj)

Ne sekvas al sinjora vol’  
Kun sklava diligento —  
Defendas rajton de l’ popol’  
La Ruĝa Regimento.

Ne trompos nin el la palac’,  
Nek de l’ ambono<sup>[1]</sup> pia:  
La gvida signo de l’ amas’,  
Standardo ruĝa nia!

Jen oni flustras: la patri’  
Sanktaĵo estas granda!...  
Do sangon nian verŝu ni  
Por la “bonstato” landa!...

Kaj ni rekrias: iru for,  
Sanguloj, vi nin trompas.  
Leviĝas filo de l’ labor’  
Kaj tronojn viajn rompas!

Ne la fremdulo — malamik’,  
Venkinta, ĉu venkita,



Sed nin kaj lin premanta klik'<sup>[2]</sup>

De l'bando parazita.

Ne trompos nin el la palac',

Nek de l' ambono fia —

La gvida signo de l' amas',

Standardo ruĝa nia!

Kreskigis nin en la kampar',

En la uzin' laboroj —

Nin premis reĝo, jugis car',

Avido de l' sinjoroj.

Bonstate ili nutris sin

El nia mizerego...

Nun jam por ili estas fin'

Kaj por ilia rego.

Pri nia sango kaj labor'

Nur ili ridis moke...

Nun ni jam pelu ilin for

Kaj ilin ŝiru floke!...

Hej, kamaradoj! Al la cel'

Eliru el turmento!

La fratojn savos en rebel'

La Ruĝa Regimento!

Standardon alte je signal'

Disvolvas en la vento

# Kaj ĵetas sin al la batal' La Ruĝa Regimento!...

El la pola trad. *N. Nekrasov.*

## Piednotoj

1. ↑ predika pupitro.
2. ↑ klano (fr.: clique).

48. Funebra kanto  
Memore pri la “popolvolano” Ĉerniŝev

En la malliber’ turmentita  
Vi finis per morto en glor’,  
En lukto por bon’ de l’ popolo  
Vi mortis kun deca honor’.

Por nia komuna afero  
Vi servis honeste sen tromp’  
Kaj ni, viaj fratoj — amikoj,  
Vin portis funebre al tomb’...

Ne mokis vin la malamiko,  
Ĉirkaŭis vin sole nur ni  
Kaj viajn okulojn, karulo,  
Mem fermis silente al vi...

Ne la malfeliĉo nin premis,  
Ne brilis bedaŭra larmer’,  
Dum ni vian cindron en ĉerko  
Per sablo ĵetkovris en ter’.

Ho ne! — nin incitis kolero,  
Batali aspiris ja ni.

Kaj jen super via kadavro  
Ni ĵuris revenĝi pro vi.

La saman ni havas vojiron:  
Forputros ni en la karcer’  
Kaj ja kiel vi ni pereos  
Por sankta popola afer’.

Kaj eble ni estos utile  
Nur grundo por nova homar’,  
Nur kiel minac-profetaĵo  
Pri vivo estonta en klar’...

Kaj ni, kiel vi, scias ankaŭ,  
Ke baldaŭ el ostoj de ni  
Leviĝos venĝanto pli forta  
Kaj venĝos al la tirani’.

*Trad. N. Nekrasov.* [\[1\]](#)

1. [↑](#) Rim.: Tiu ĉi kanto estis la plej amata de Lenin. La partio „Narodnaja Volja“ (Popola Volo — la vorto „volja“ samtempe signifas „volo“ kaj „libero“) estis unua terorista revolucia partio en Rusio

## 49. Tenu la fortikaĵon!

El angla tradukis *D. A. Klagin*<sup>[1]</sup>

Kanto de strikantaj anglaj transportistoj “Hold the fort!”

Liberec’ nin kunvenigas,  
Laŭtvoĉigas nin;  
Manpremante unuiĝu,  
Oferante sin.

Ĥoraĵo:

Tenu ni la fortikaĵon  
Por la unuiĝ’,  
Flank’ ĉe flanko ni batalu  
Ĝis trafita venk’!

Kamaradoj, unuiĝo  
Flirta kun flagar’  
Estas vera plifortiĝo,  
Venk’ laboristar’.

Ĥoraĵo.

Vidu kreski la membraron,  
Sonas trumpetar’!  
Unuiĝo nun triumfos,

For malamikar’!  
Hôraĵo.

Furiozas batalado,  
Sed ne timos ni!  
Helpi venos kamaradoj,  
Venkos la konsci’!  
Hôraĵo.

## Piednotoj

1. [↑](#) Melodio ne liverita.

## 50. La ruĝarmeana stelo

De *Demjan Bedny*

Ne de la Marso sanga di'  
Al ni lumadas la radi',  
Ne pro malnobla kapital'  
De pop', nobelo, general',  
En vic' ni iras al la mort',  
Batalas kontraŭ la perfort'

En kampo kiel la papav',  
La signo brilas — nia sav',  
La atestant' de ligo — ĝi  
De laborista famili'  
Simbolo de l' estonta bel' —  
Ruĝarmeana vi, la stel'

La tuta band' de parazit'  
Vivanta je labora ŝvit',  
Riĉuloj kaj la arane',  
Batatoj de la Ruĝ-Arme',  
Kriegas laŭte kun malplaĉ',  
Ĉar sentas morton la hundaĉ!

Rekantaĵo:



Sed kiuj vivis je kondiĉ',  
De laborista la malriĉ',  
Amikoj de l' Sovet-ide',  
Savataj de la Ruĝ-Arme',  
Renkonte kuras kun la dec'  
Liberigantojn el sklavec'.

Rekantaĵo:

Tra urboj, kampo kaj la mar',  
Sub ruĝa flag', laboristar',  
Ni ĉiuj iras man' ĉe man',  
Alportas morton al tiran',  
Al la suĉintoj dum jarcent'  
La sangon de malriĉa gent'.

Rekantaĵo:

Ni estas nur la avangard',  
Tutmonda laborista gard',  
Post ni l' armeo iras tuj,  
Por estu mondo-Sovetuj',  
Jam aŭdas burĝoj kun angor',  
Triumfan iron de labor'!

Rekantaĵo:

El la rusa trad. *G. Rozenblat.*

## 51. Batalo

Bulgara

Poezio de *Hristo Botev* — Muziko de *Dobri Hristov*

Juneco en ĉagrenoj foriras  
Kolare kuras sango, deliras  
Mi kvazaŭ... Vane mens' vidi penas  
Ĉu bono aŭ malbono alvenas.

Pasinto nigra kuŝas en koro,  
Ripetas ĝin malica memoro.  
En brusto velkas amo kaj vero  
Ekveki homon mortis espero —  
Ĉu revekiĝus iu bravulo?  
Bravulon pensas ni frenezulo.  
Friponon ĉie oni estimas:  
“Li riĉas“ diri oni kutimas.  
Riĉulo, fratoj, vivan bruligas,  
Orfaron rabas, enkatenigas,  
Kaj ofte staras antaŭ l' altaro

Por trompi vin per sia preĝaro —  
Kaj tiun hom' — premulon inspiras,  
Kaj instruisto filozofias,  
Al gazetisto kunharmonias,

Ke timi tion estas komenco  
De la saĝeco... Sklava sentenco!  
Ja ŝafofelaj lupoj ĝin diris, —  
Sankcii la katenojn deziris,  
Subpremi iun senton kaj penson,  
Kaj enkateni homan la menson.  
Tiran' Salomo, diboĉe sprita,  
En Paradizon ien sendita,  
Kun sentencaro sia la stulta  
Sentencon diris inter la multa,  
Kaj vivas ĝi en ĉies animo:  
Timu je Dio, reĝon estimu!  
„Sankta stultaĝ"! Centjarojn batalas  
Kontraŭ ĝi menso kaj konscienco,  
Bravuloj ĉiam falis kaj falas,  
Sed kion faris? Vivon sen senco  
Popol' trenadas, — morte suferas,  
Kviete la premulojn toleras,  
Kisadas de l' fripono la manon  
Kaj kredas la trompantan tiranon:  
Se oni vin batas — preĝu, silentu,  
Kaj lupu se vin mordas, popolo,  
Se sangon vian suĉas serpento, —  
Preĝadu: Dia volas ĝin volo:  
“Ho Dio, min pekulon pardonu!” —  
Por ke li punon al vi ne donu.  
Tiel mond' iras! Sklavec' malvero  
Reĝas unu sur tuta la tero  
Kaj estas sklava ja testamento

Dum ĉiu malfeliĉa momento...  
En tiu regno de la perfido,  
De malĉastado, sangoj, insido, —  
Senlima regno de la malbono —

Batalo bolas, iras kun sono  
Al sia fin' sankta... ĝis al la tiran'  
Ekkrios ni: "Kuglo aŭ Pan"“!

Tradukis el bulgara *Ivan Dobrev*,  
Pleven 1924, 10. V.

## 52. En la drinkejo

Bulgara

Poezio Hr. Botev

Muziko D. Hristov

Ho, sufoke! Vinon donu!  
Ke forgesu mi ebria  
Kion stultaj, vi ne scias  
Ĉu ĝi estas fal' aŭ gloro!

Ke forgesu landon karan  
Kaj malriĉan la tegmenton,  
Inspiritan volon klaran —  
Por batali testamenton!

En ebrion mi fordroni,  
Ekforgesi mizerecon —  
Kiel noble rabas oni  
Ekmorditan la panpecon!

Rabas riĉegul' perfida,  
Rabas nud-popolon ĉie,  
Komercesto oravida,  
Kaj la pastro-liturgie!

Rabu, rabu ĝin, tiranoj!  
Rabu, kiu vin forpelos?  
Dormas ĝi, ne ekribelos:  
Glasojn tenas niaj manoj!

Drinkas, kantas ni, braviĝas  
Kaj minacas la tiranon...  
Kiam ni jam ebriiĝas —  
Krias: “Ĉiuj sur Balkanon!”

Sobraj kiam nin revidas,  
Ni forgesas ĵuran vorton,  
Kaj ekmutas kaj jeridas  
De l' bravuloj sanktan morton!

Kaj tiranoj senvirgigas,  
Maŝon ĵetas sur la kolon,  
Batas, buĉas kaj pendigas  
Kaj rabadas la popolon!

Ho, enverŝu! Mi drinkados —  
Al animo faciliĝu,  
Sentojn sobrajn mortigados —  
Mano vira ekmoliĝu!

Drinkos spite tiranaron,  
Spite vin, ho patriotoj!

Ni jam perdis ĉion karan,  
Kaj vi estas... idiotoj!

Trad. *Iv. Dobrev.*



### 53. Antaŭen laboristaro

De *Henriko Stark.* Esperantigis *J. K.*

Hungara

Antaŭen laboristaro, faru vian devon!  
Tondranta voko sonas nun, rompu vian ĉenon!  
Kial do vi toleras plu turmenton de l' tiran'!  
Skuante for jugon vian, kunligu nin homam'  
Skuante for jugon vian, kunligu nin homam'.

Tagiĝas jam la nova tag', post nokto venas hel'  
Eĉ nokte ni ne timas nun, brilas la ruĝa stel'  
Antaŭen, do, fratoj niaj, triumfi devas ni:  
Sonu tondrante voĉ' nia: liberaj estu ni,  
Sonu tondrante voĉ' nia: liberaj estu ni.

## 54. Al batal'!

Pola

Al batal'! Kiu frat', kamarad'  
Kaj en kies animo esper'!  
:| Hej eksonu en mond' la martelekbat'!  
Al batal' pro la viv', pro liber'! :|

Nia verk' ja la hard' de la krad',  
Mem ni forĝis katenon el fer'.  
:| Mem ni rompu la murojn de l' kazemat',  
Al batal', pro la viv', pro liber'! :|

Ĉu ne jam vipis nin ekspluat',  
Kie Di' la regant' de l' sufer'?  
:| Ne preĝu ni pluen — ne venos kompat' —  
Al batal' pro la viv', pro liber'!

Sanga sign' fajros en sunkaskad',  
Sign' purpura, la flor' de l' sufer' —  
:| Al batal'! Kiu frat', kamarad',  
Al batal' pro la viv', pro liber'!

## 55. En malliberejo

Estona

Muziko de *Fritz Bunge*<sup>[1]</sup>

Mi havis sufiĉe da gekamaradoj  
Dum daŭro de mia estinta bonfart',  
Sed ĉiuj restigis min, kiel folioj  
La arbon forlasas aŭtune sur kort'.

Ajn estu! La arbo denove posedos  
Foliojn en freŝe venonta printemp'.  
Mi same ankoraŭ estonte ekvivos,  
Sed por la folioj restados nur tomb'.

Originale de *Raimond Neitrik*  
en Revala centra malliberejo (1922).

## Piednotoj

1. <sup>↑</sup> Teksto kaj muziko originalaj, unuafoje presitaj.

## 65. Ekstaru ni Proletaroj

Hungara

De *Novák Karlo*. Esperantigis *J. K.*

Teksto de *Vanczác J.*

Por virĥoro

Melodio de *Novák Karlo*.

Ekstaru ni proletaroj,  
Jen alvenis la tempo  
El la ĉiel' sunradia  
Vokas nin la estonto.  
Per la amo en la koro  
Inter fratoj falu mont',  
Laŭsciigu nia kanto  
La aperon de nova mond'.

Antaŭen, antaŭen proletar'  
Por la cel' de l' homar'  
Liberec' kaj la amo  
Estu por ni la palm'.

## 57. Proletoj Unuiĝu

Belga

Dediĉita al la anoj de la Kongreso Internacia Laborista Socialista.

Teksto de *Jacques Gueux*; tradukis *Léon Bergiers*.

Muziko de *C. Dujardin*.

Prematoj vi ĉiuj estas fratoj,  
En ĝojo kiel en mizer',  
Malgraŭ limobaroj de l' ŝtatoj  
Interamiĝu kun sincer'. —  
Malakordo inter la rasoj,  
Disŝiranto de la homar',  
Foriĝu sen stampo de l' masoj,  
Kaj vivu frateco, fratar'. —

Por ke fekunda pac' regu en tera rondo,  
Por ke sub suno-rid' baldaŭ tutmond' feliĉu —  
En ĉi-tago la solena vi proletoj de l' mondo  
Unuiĝu, unuiĝu, unuiĝu.

Difektis jam troon la milito,  
Falĉante vicojn sen kompat',  
Ĉesu kruda batalekscito,  
Kia estas tirancelad'.  
Ĉu vi ne laciĝas verŝante

Vian sangon por malbonul'  
Kiu trovas prava vin rabante,  
Vivadas parazita ul'?

Rekantaĵo:

Unuiĝ' por vidi naskodaton  
De l' temp' de amo kaj konkord',  
Por ekĝui fine bonstaton  
En granda tag' de l' nova ord'.  
Unuiĝu por ke la tero  
Kovru sin per spikoj kaj flor',  
Por ke pereu la mizero,  
Kaj ke sekiĝu arda plor'.

Rekantaĵo:

## 58. Ni rompu niajn ĉenojn

Belga

Teksto de *Jacques Queux*. Muziko de *Henri Weyts*

Trad. *L. Bergiers*

Nia estontec' estis malhelo,  
Kaj ni ĉiam suferis tiome,  
Sed nuboplana nia ĉielo  
Sereniĝis jam iom-iome.  
Kiel kverk' fortikaj-energiaj,  
Ni knabegoj brako-solidaj  
Volas rompi ĉenojn niajn,  
Estas ni feliĉ-avidaj.

Nu! antaŭen, plebejanoj,  
Ni servutaj kamparanoj,  
Ankaŭ ni, urbanoj en mizer',  
Ke reakcion ni tremigu,  
Ke sama nin dev' unuigu,  
Ni kantu por liber'! —  
Marŝu, marŝu, nin kunigu!  
Ekmarŝu ni —

Ni montros al suferigantoj  
Ĉi-kio vere estas ni.  
Ke homoj estas ni sangantaj,  
Ne bestoj aĉaj sen raci'.  
De longa tempo sklavigitajn,  
Oni daŭre teni nin povis, —  
Nun, kuraĝo-plenigitaj,  
Elirejon ni jam trovis.  
Rekantaĵo

Se volas ni ke nia revo  
Tuj fariĝu la realec':  
Se volas ni ke sin eklevu  
Pura astro de l' egalec':  
Se volas ni ke ne frakasu  
Tuthomaron prema sistemo —  
Ne, proletoj, preterlasu,  
Ĉie manojn interpremu!  
Rekantaĵo



## 59. Laborista alvoko

Jugoslava

De *Aŭgust Gostinĉar*

Laborist' vekigŭ  
El profunda songŭ,  
Al vi aŭror' flamu  
Brilu arda sun'  
De konkordo voĉo  
Levu sin ĝis ĉiel',  
Savo en ĝi estas de ora liber',  
Savo en ĝi estas de ora liber'  
De liber' sav'.

Eksciu Eŭropo  
Kaj la tuta mond',  
Por kulturo pretaj  
Estas ni por mort'.  
Nur minacu al ni  
Sklavo de miljar'  
Pro honesta tomb' dolĉe mortas jam  
Pro honesta tomb' dolĉe mortas jam  
Pro tombo.

60. Himno de Tipografa kanta ĥoro „Sloga“  
Jugoslava

(“Sloga“ = “Konkordo“)

De *Aŭgust Gostinĉar*

En liber' vokas arda flam  
Ekflamis sklava bonhumor'  
Ekbolu demon' de tiran'  
Per mort' ni viŝos vin ja for  
Ni devas kiel fulmo kran'  
En fiero iri tra la flam'.  
Kie estas rajtoj?  
Ĉu ni estas sklavoj  
Aŭ memstaraj homoj?  
Kie liber' nia?  
Filoj jam levu vin  
Ke justec' veku sin.  
Turmentata gento  
Levu vin, sklavoj jam! Ho!

Rajtojn ni juĝos jam.  
Levu vin sklavaro,  
Sufiĉe jam al ni estas  
Al ni de batal' partia.  
Fratoj, en konkord estas sav'

Unuec' al konkord' vokas nun jam nin.  
Disrompu la katenojn  
De tirani', ruza tiranio  
Kie konkord regas, estas liber'  
Pro malkonkord' mortas la liber'.

Zagreb, la 30. de majo 1924.  
Transskribis: *F. Kramariĉ*.

## 61. Marŝo de finna Laboristaro

*Oskar Merikanto*

Pontevasti

Tradukis: Progresanoj en Wiipuri

Antaŭen marŝu proletar'  
Malforta ne plu estu,  
De nun ne estu nur sklavar'  
Sed liberecon festu.  
Deziras kion via kor'  
Aŭ faras via man-labor'  
:!: Ĝi barojn ĉiajn igos for :!:

Tre nobla estas laborad'  
Farate de la mano,  
Spiritan nokton per studad',  
Forigu ni laŭ plano.  
Ne gloravido de la kor'  
Devigu nin al la labor'  
:!: Sed nur feliĉo kaj honor' :!:

## 62. Mia preĝo

Bulgara

Poezio *Hristo Botev* — Muziko *Al. Kretev*

Dio mia, justa Dio,  
Ne vi en ĉiela foro,  
Mi nur preĝas al vi, Dio,  
Kiun sentas mi en koro.

Ne vi, kiun tro adoras  
Pastroj kaj monaĥoj piaj  
Kaj al kiu monsonoras  
Ortodoksaj brutoj niaj.

Ne vi, kiu el ter' kreis  
pragehomojn por sufero —  
Fratoj miaj jam pereis  
Sklave vivi sur la tero.

Ne vi, kiu nur sankcias  
Patriarkojn, papojn, reĝojn —  
Pri sklavaro vi ne scias,  
Vi ne aŭdas ĝiajn preĝojn.

Ne vi, Dio mensogula

De tiranoj hipokritaj,  
Ne, idolo mortigula  
De vivuloj sklavigitaj.

Sed vi, Dio de l' prudento,  
Defendanto de l' sklavaro,  
Kies feston de konsento  
Baldaŭ gloros la homaro!

En animojn Vi inspiru  
Al libero amon koran  
Por ke peli ĉiu iru  
Malamikon senhonoran!

Faru manon mian ŝtalo,  
Armu min per fera povo:  
En la fajro de l' batalo  
Ankaŭ mi la morton trovu!

En land' fremda junan koron  
Vi ne lasu velki, Dio —  
Silentiĝi mian vokon  
Kvazaŭ en dezerto krio.

El la bulgara tradukis *Ivan Dobrev*.



## 63. Haĝi Dimitro

Bulgara

Teksto de *Hristo Botev*. — Muziko de *Zajc*.

Viva li estas... Sur la Balkano  
En sang' dronanta kuŝas kaj ĝemas  
Vundita bruste juna bandano —  
Profunda vundo la korpon premas.  
    Pafilo ŝtala jene vidiĝas,  
    Rompita sabro flanke... li svenas...  
    Krepuska vido: kapo skuiĝas, —  
    La tutan mondon buŝo malbenas.

Li kuŝas... Kaj elsupre sen fino  
Suno haltinta brilas kolere,  
En kampar' kantas juna sklavino,  
Kaj sango pli elfluas libere.

Rikolto estas... kantu, popolo,  
Malgaje! Kantu, fratoj, kaj ploru!  
En sklava land' pereos en solo  
Bravul'! sed, mia kor' ne doloru!

Ja kiu falos por la Libero,  
Mortas neniam! pro li ekploras



Naturo, besto, nubo kaj tero  
Kaj bardoj mira-kante lin gloras.  
    Lin subombrigas aglo fiera,  
    La vundon lekas lupo-kunfrato,  
    Falko fortika — birdo libera —  
    apude ankaŭ zorgas pri frato.

Vespero venas, luno ekbrilas,  
Surŝutas steloj foron ĉielan,  
Blovetas vento, arboj babilas.  
Balkano kantas kanton ribelan.  
    Feinoj en blankaĵo irflue  
    Komencas kanton — jen proksimiĝas,  
    Surpaŝas verdan herbon senbrue  
    Kaj al vundito venas, sidiĝas.

Jen unu lin karesas facile,  
Sur vundon dua herbojn surmetas,  
Je lipoj tria kisas subtile...  
Li ŝin rigardas — ŝi nur ridetas.  
    Fratino, diru, diru la sorton  
    De Karaĝa, kaj bando fidela,  
    Ho diru — poste sendu la morton,  
    Min poste prenu morto la stela...

Feinoj aŭdas lian deziron,  
Ĉielon ili flugas kantante,  
Flugadas en la vastan zefiron,  
De Karaĝa, spiriton serĉante.

Jam mateniĝis... Sur la Balkano  
Venenan vundon lupo lekadas,  
Trankvile dormas juna bandano,  
Kaj suno ree brilas, briladas.

Tradukis el bulgara *Iv. Dobrev.*

## 64. La Soldata Kanto<sup>[1]</sup>

(anonima)

Kastilia

Muz. *J. Serrano.*

Por defendi tiranojn  
Kazernon veninta,  
Hontegon mi sentadas,  
Ĉar mi enirinta.  
Krimul' mi iĝis  
Per la uniform'.  
Vidante la traktadon,  
Donatan en kazern',  
La patrino de l' soldato  
Estas ploranta lin.  
Patrino mia, mia,  
Ne indas mi por vivi —  
Fremdajn patrinojn ofendante,  
Mi ankaŭ ofendas vin. —  
Ĵurpromeson mi faris,  
Sed ĝi ja ne valoras,  
Ĉar la flago mia  
Estas el libereco kaj amo.  
Ĵurpromeson mi faris,  
Sed ĝi ne estis valora,

Ĉar estis la tiraneco,  
Kiu, en tiu tago,  
Al mi ĝin forrabis.  
Kaj mi batalos nur  
En la nomo de l' sankta libereco.  
Kaj la amo, kiun mia animo enfermas,  
Malbenante la militon,

Pulsante estas: Kial mortigi?!, kial mortigi?  
Anarkio, patrino mia;  
Nur vi impulsas min al la heroago,  
Superante la epopeojn  
De l' Granda Revolucio.  
Fratoj: La mondo esperas  
De niaj klopodo kaj kuraĝo,  
Ke vi detruos per la ŝtalo  
La tiranecon kaj la subpremon.

El kastillingvo tradukis *Barcelona Grupo de S.A.T.-anoj*

## Piednotoj

1. ↑ Eble ni ne ĉion sukcese adaptis al muziko. Ni pli mallongigis la originalan muziktekston, forlasante iajn

partojn. Niaj hispaniaj kamaradoj, ne liverinte  
ellaborite la materialon, trarigardu, juĝu, ĉu ni sukcesis  
k. helpu plibonigi, se necese. — Eld.

## 65. La liberula kanto<sup>[1]</sup>

Hispana

De *J. M. Blazquez de Pedro*

Mi estas libera, mi estas libera;  
Mi estas homo, mi estas homo.  
Ne plu patrioj, ne plu leĝoj,  
Ne plu mastroj, ne plu dioj;  
Ne plu juĝistoj, nek registaroj, kiuj subtenu arbitre  
Tiun farson tiom maljustan, kiun la friponoj nomas ordo;

Ne plu baroj nek landlimoj  
Ne plu falsaj savantoj  
Ne plu pastro, karcergardisto,  
Reĝo, sinjoro nek policisto;

Ne plu azenaj soldatetoj, obeantaj kaj ne pensantaj,  
Kiuj libere murdas, kiuj kvazaŭ bestoj interbuĉas sin

Kun tiuj de aliaj popoloj  
Pro aliulaj ambicioj  
Eĉ apenaŭ ne konante sin,  
Senkonsciaj, fiaj, malsaĝuloj.

En viaj agoj mi ne rajtas kaj ne volas, ke en tiuj miaj  
Pro ia cirkonstanco iu estulo altrudiĝu.

Mi estas mia kaj volas kaj povas  
Min regi sen paŝtistoj  
Per miaj propraj energioj,  
Per miaj propraj ecoj liberaj.

Regi sin mem ĉiu homo kutimiĝu  
Kiu akceptas, ke alia estu la juĝanto de liaj agoj,

Estas bruto, kiu havas nur  
Formon kaj nomon homajn,  
Estas ŝtono de l' muroj,  
Kiujn oni starigas al la Progreso.

Por mortigi oni ne forprenu min; mia amo al la homoj  
Ne estu mallumigata de povorganismoj humiligantaj.

Mi estas mia  
Mi estas homo;  
Mi ne volas  
Ĉirkaŭbarojn.

El la interno de mia brusto elŝprucas amaj ondoj  
Por ĉiuj vivantoj, kiuj travagas tra la tero.  
Tiujn spontanajn ondojn de ne mezureblaj amoj

Oni vidos iĝintaj malamoj, spite de miaj noblaj deziroj,

Kiam iu intencos  
Alproprigi al si teron kaj ĝuojn,  
Fari leĝojn, kiuj devigos min  
Aŭ malpermesi, ke mi rezonu.

Mi vivi ne volas en pli supera nek en pli suba rango ol la aliaj;

Pacame vivi mi volas ĉe iliaj altecoj.

Kiu vere estas libera, tiu neniam emas perforton,

Do moviĝas ribelemoj, ĉar ekzistas premaj povoj.

(Ni iru, subkomprenate);

Esti liberaj inter la liberuloj,  
Esti sunaj inter sunoj,  
Doni pruvojn, ke nenio  
Estas pli granda ol la homoj.

El hispanlingvo tradukis *Barcelona Grupo de SAT-anoj*.

## Piednotoj

1. ↑ Muziknotoj ne ricevitaj de 65 kaj [66](#).



## 66. La kanto de l' komunisto

Hispana

De *J. M. Blázquez de Pedro*

Vekiĝu, malfeliĉaj proletoj,  
Vekiĝu, martiraj kamaradoj,  
Vekiĝu, el heredata senkonscio  
Vekiĝu el la letargio de l' jarcentoj;  
Forĵetu malkuraĝojn, vantaĵojn,  
Tradiciojn, dogmojn kaj atavismojn.  
Rapidu, satanaj furiozuloj, venĝemaj,  
Energiaj kaj malhumilaj, rompi por ĉiam  
La katenojn de subpremo, senkonscio kaj  
Despotismo, kiuj igas nin en mizerajn  
Bestojn kaj en eternajn subtenilojn de l' fiuloj.

Ni prenu la fosilojn  
Ni pensu fervorege  
Ni alprenu la torĉojn  
De nia racio,  
Ke ili estu la kaŭterizilo  
De ĉio, kio estas putra,  
Kaj liberiga aŭroro  
Signante la vojon,  
Kondukantan la prematojn

Al bono de l' Komunismo.  
Ĉio estu ĉies!  
Falu la vampiroj!

Ni ne ĉesu momenton en la batalo,  
Al lukto kun bravega kuraĝo;  
Al fordetrudo de l' malliberejoj kaj karceroj,  
Al malekzisto de l'kodoj kaj ŝtatoj;

Al transformo de l' preĝejoj en lernejojn;  
Al la alproprigo de la palacoj;  
Al ekstermo de l' monaĥejoj kaj kazernoj,  
Tiuĵ domoj de malvirto rafinita,  
En kiuj la homoj fariĝas fradmortigantoj,  
Murdistoj, memmortigantoj kaj parazitaj;  
Al socialigo de l' tero kaj aĵoj  
Kaj al bruligado de l' privatposedulaj registroj.

Nur tiel ni povos  
Esti liberaj, esti humanaj,  
Feliĉaj, bonaj, justaj,  
Potencaj kaj kleraj,  
Kaj konduti pri ĉio  
Kun humana sento.  
Ni komunigu proprajn,  
Ĝuojn kaj laborojn.  
La homo ne plu estu

De homoj ekspluatata!  
Regu Anarkio  
Kaj vasta Komunismo!

El hispanlingvo tradukis *Barcelona Grupo de SAT-anoj*.

## 67. Ni eltenu!

Finna

Verkis *Antti Salojoki*. — Komp. *Korven poika*.

La infanoj ni estas de malgaja ter',  
Ofenditaj sur mortvojoj iris!  
Kaj ankoraŭ terurojn ni vidas laŭ ver',  
En la tombon nin oni subpremis!  
El la vejnoj la sango verŝiĝis sur voj'!  
Por al ili aperu honoro kaj ĝoj'!  
Ni ja portis ventegojn de forta regres',  
Kaj pli certe jen kapoj stariĝu, ho jes!  
Nin ne kaptos la korvoj, disfrakasas ne,  
Kvankam zorgojn sonoras la kant-ono, ve!  
Tial ree stariĝu la kapo de mi,  
Ĉar la venkon ankoraŭ do vidos ja ni!  
Kaj la citro d' espero sonadu laŭ fort'!  
Nia estos la nova, la fortika vort'!

Trad. *Progresanoj en Wiipuri*.

## 68. La batalanto de la ĉina revolucio<sup>[1]</sup>

Ĉina

(Tradukita prozen)

La plejgranda beno sur la mondo estas la libereco.

Kiam la libereco sin bazas sur paco, estas plenumebraj miloj da mirindaĵoj sur la mondo.

La libereco profundas kiel la spirito! Kiel giganto ĝi grandas!

Ĝis la ĉielo ĝi estas alvenebla; ne per ĉevalo kaj veturilo, sed sur nuboj kun la vento.

Venu, ho, venu libereco kaj regu sur la tero!

Pro la terurega sklavar-infero venu nin lumigi per radio de l' suno!

Novan, plibonan mondon ni deziras en nia tempo.

Hin-ju, nia maljuna patro, gvidu nin!

Liberec-spirito venu kaj ŝirmu nin!

Esperantigis: *I. Jurysta.*

## Piednotoj

1. <sup>↑</sup> sen melodio.

69. Ĉina laborista kanto<sup>[1]</sup>  
de *Can-gujang-ci*

Leviĝu multsufera popolo de Ĉini'  
Ja ege piedpremas nin imperiismo;  
Se tuje kontraŭ ĝi ne ribelos fratoj ni —  
Eterne estos ni en de mallum' abismo.

Imperiistan premon for!  
Senjuga estu lando nia.  
Ĝi estas nia propra zorg' —  
Rapidu do popol' ĉinia!

Leviĝu, ho leviĝu popolo-suferant'!  
Nin fimilitaristoj ja senlime premas;  
Aŭskultu! Ni ne estu kanona plu viand  
Kaj tial ekribeli fine ni ja devas!

Militaristojn rabajn for!  
Rompiĝu de l' suferoj ĉeno!  
Ĝi estas nia propra zorg' —  
Kaj ni komencu ĝin sen ĝeno!

Sufiĉas jam sklaveco, sufiĉas jam sufer' —  
Leviĝu vi, popolo, dronanta en doloro!  
Batali se ni tuj komencos por liber' —  
Eterne ni vegetos en la malhonoro.

Kuraĝe al revoluci'  
Sub la standardo ruĝ-ardanta!  
Ĉar tio estas zorg' de ni  
Ĝin estu ni jam komencantaj!

## Piednotoj

1. ↑ Sen melodio.

70. Himno de l' laboristoj  
Verkita de *N. Minski*, laŭ muziko de *I. Ŝvedov*.

Pli kaj pli proletarioj unuiĝu!  
Nia volo, kaj potenco, kaj fortik'!  
Por la lasta fest'-batalo kolektiĝu!  
Mortu nia kontraŭulo malamik'!

Garde staru ĉirkaŭ tuta nia mondo  
Kaj antaŭen marŝu ni en ĝusta hor'...  
Falos baldaŭ antaŭ la popola ondo  
Malamiko kaj ekĝojos nia kor'!

Mond' aperos el ruinoj post brulado,  
Per la sango akirita nova mond';  
Laborist', kun ni kuniĝu, kamarado —  
Sed sinjoroj iru for el nia rond'!

Kamaradoj! per feliĉo ebriiĝu, —  
Sur la tero ĉio nia estas nun!  
Pli kaj pli proletarioj unuiĝu, —  
La standard' por ni nun estas ruĝa sun'!

Esperantigis *V. N. Devjatnin*.





## 71. Ruĝarmeaniĝo

Tre populara nova kanto en Sovetio, verkita de  
*D. Bedny*

Kiam la patrin' al mi  
Adiaŭis,  
:! Mia tuta famili'  
Nin ĉirkaŭis; !:

“Kien do, bravulo, he!  
Vi foriras?  
:! Kio do al ruĝarme'  
Vin altiras? !:

Ĉu vin logis per envi'  
Malamikoj?  
:! Fartos bone eĉ sen vi  
Bolŝevikoj! !:

Ĉu vi iras laŭ ordon'?  
Ĉu volonte?  
:! Ja pereos sen bezon'  
Vi estonte! !:

La patrino — griza hom'

Pro vi estas.  
:! Por labori en la dom'  
Multo restas. :!:

Patra hejmo gardos vin  
Sendanĝere.  
:! Geedziĝu kun knabin'  
Vi prefere! :!:

Vi ne cedas laŭ dezir' —  
Diablo prenu! —  
:! Pli ni ŝatos post konkir'  
La edenon. :!:

Vi feliĉe loĝos kun  
La edzino!“ —  
:! Tiam mi kliniĝis nun  
Al patrino. :!:

Kaj al tuta diris mi  
Familio:  
:! “Ne pri mi bedaŭru vi  
Do pro dio! :!:

Se ni estus, kiel vi,  
Malsaĝuloj,  
:! Plej mizere sidus ni  
En anguloj. :!:

Se nin ĉiujn senzorgem'  
Kaptus vante,  
:! Mem ni restus sub la prem'  
Por konstante :!:

Ruĝarmeon iras mi  
Ne por balo —  
:! Kontraŭ burĝa tirani'  
Al batalo! :!:

Por paroli kun magnat' —  
Solrimedo:  
:! Al la dika ventro — bat'  
Per piedo! :!:

La edeno — ne de l' band'  
Tirania:  
:! La plej bela, kara land'  
Sovetia!“ :!:

El la rusa trad. *N. Nekrasov.*

## 72. La ĵuro

Juda

(Di ŝvue)

Gefratoj de l' juga labor' kaj mizer'  
En ĉiuj anguloj kaj lokoj de l' ter',  
Kuniĝu, kuniĝu: standardo de l' ver'  
Jen flamas pro sango, pro venĝa koler'!

Ni ĵuru vivmorte por nia afer'!

Aŭdas nin tero ĉarma,

Ĉielo malvarma.

Ho ĵuro, ho ĵuro sanganta kaj larma!

Ni ĵuras, ni ĵuras, ni ĵuras!

Ni ĵuras batali en plena akord'  
Kun ĉiuj tiranoj de nia vivsort'.  
Ni venku ilian potencon kun fort'  
Aŭ falu dum lukto heroe en mort'.

Ni falu dum lukto heroe en mort'.

Aŭdas nin ktp.

Ni ĵuras malami per sango de l' kor'  
Rabistojn de nia porpana labor'.  
La reĝojn, regantojn, friponojn de l' or'  
Ekstermi kaj peli nun ĵuras ni for.

Ekstermi kaj peli nun ĵuras ni for.  
Aŭdas nin ktp.

Ni ĵuras pri sankta batalo laŭ prav'  
Por certe konduki la mondon al sav'.  
Ni ĵuras la celon konkiri kun brav',  
Ke estu nek iu sinjoro, nek sklav'!  
Ekzistu nek iu sinjoro, nek sklav'!  
Aŭdas nin ktp.

El la hebrea trad. *N. Nekrasov* (kun helpo de *G. Bransburg*).

73. “Kamarada kanto“

(Druĵna pesen)

verkita de *G. Kirkov.*

Kamarada kanto sonu,  
Kanto de labor’,  
Al la koroj viglon donu.  
Vivu la labor’!

Plej mirinda estas gloro,  
Gloro al labor’.  
Ĉio vivas pro laboro.  
Vivu la labor’!

De la sago de pagano  
Ĝis maŝinmotor’ —  
Ĉion faris pen’ de l’ mano.  
Vivu la labor’!

Levu fruktojn kun fiero,  
Sklavoj de l’ labor’:  
Estas reĝoj vi de l’ tero.  
Vivu la labor’!

La standardon levu alte,

Sklavoj de l' labor'!  
Sonu kanto nun senhalte,  
Kanto de l' labor'!

El la bulgara trad. *N. Nekrasov* (kun helpo de *K. Mateev*).



## 74. La Karmanjolo 1924

Franca (Libera traduko de l' Karmanjolo 1869 el franca kaj  
2 orig. strofoj).

Do kion volas ribelul'?  
Do kion volas ribelul'?  
Liberon por la senhavul',  
Liberon por la senhavul',  
Pioçon por ribel',  
La torçon en kastel' —  
Kaj pacon al kaban',  
Vivu la son',  
Vivu la son'  
Kaj pacon al kaban',  
Vivu la son',  
Vivu la son',  
Dancu ni karmanjolon,  
Vivu la son'  
De l'kanon'. —

Insistas kion ribelul'?  
Insistas kion ribelul'?  
Justecon por la senhavul',  
Justecon por la senhavul'.  
Ne plu premata band',

Ne plu riĉul'-regant'  
Militon al tiran' ktp.

Deziras kion ribelul'?  
Deziras kion ribelul'?  
Pasigi vivon sen pastrul',  
Pasigi vivon sen pastrul',  
La Kriston al rubej',  
Virginon al bovej',  
Dipatron al satan', ktp.

Bezonas kion ribelul'?  
Bezonas kion ribelul'?  
Ŝtalaĵojn krom panero-bul',  
Ŝtalaĵojn kroni panero-bul',  
La ŝtalon por labor'  
Kaj por la venĝa hor',  
Kaj panon por fratar', ktp.

Postulas kion Sat-anar'?  
Postulas kion Sat-anar'?  
Ke fine venku proletar',  
Ke fine venku proletar',  
Pereu naciist',  
Naci-apologist',  
Eĉ lingva naciec', ktp.

Celadas kion Sat-anar'?  
Celadas kion Sat-anar'?

La savon de la proletar',  
La savon de la proletar',  
Sen limoj nia ter'  
Sen baroj, sen sufer', —  
Libera tuthomar'! ktp.

*N. B.*

# Indekso

## laŭ nacilingva deveno de la kantoj

(la ciferoj montras la laŭvicajn numerojn de la kantoj)

Angla .....	27, 44, 49
Belga (franca) .....	57, 58
Bulgara .....	51, 52, 62, 63, 73
Ĉeka .....	43
Ĉina .....	68, 69
Estona .....	37, 55
Finna .....	61, 67
Franca .....	2 <sup>[1]</sup> , 30, 74
Germana .....	8, 10, 32, 41
Hispana .....	65, 66
Holanda .....	28
Hungara .....	53, 56
Itala .....	17, 31
Jugoslava (kroata) .....	59, 60
Juda .....	20, 72
Kastila .....	64
Norvega .....	9, 42

1, 11, 12, 13, 21, 22, 23, 34, 35, 36, 38, 39, 40, 47, 54	
4, 5, 6, 7, 14, 18 <sup>[2]</sup> , 24, 25, 26, 33, 45 <sup>[3]</sup> , 48, 50, 70, 71	
Sennacieca <sup>[4]</sup> .....	19, 46
Sveda .....	16, 29

## Enhavo

	Paĝo
<a href="#"><u>Antaŭparolo</u></a> .....	3
1. <a href="#"><u>Nia kanto</u></a> .....	7
2. <a href="#"><u>La Internacio</u></a> .....	9
3. <a href="#"><u>Himno (Fratoj al sun')</u></a> .....	12
4. <a href="#"><u>Iru en vic' ni (La Kanto de proletarioj)</u></a> .....	13
5. <a href="#"><u>La Proletaria Marseljezo</u></a> .....	14
6. <a href="#"><u>Laborista Marseljezo</u></a> (rusa) .....	17
7. <a href="#"><u>Komunista Marseljezo</u></a> .....	18
8. <a href="#"><u>Socialista Marŝkanto</u></a> .....	20
9. <a href="#"><u>Estis nia ĉi-tero</u></a> (norv.) .....	23
10. <a href="#"><u>La Proletarioj</u></a> .....	26
11. <a href="#"><u>Ruĝa Standardo</u></a> (pola) .....	29
12. <a href="#"><u>Al barikadoj</u></a> (pola) .....	34
13. <a href="#"><u>Kanto de libera spirito</u></a> (pola) .....	36
14. <a href="#"><u>Forĝistoj ni...</u></a> (rusa) .....	40
15. <a href="#"><u>La Batalo</u></a> (portugala) .....	41
16. <a href="#"><u>La marŝo de l' junularo</u></a> (sveda) .....	47
17. <a href="#"><u>Ruĝa Gvardio</u></a> (itala) .....	48

18.	<a href="#"><u>La juna gvardio</u></a> .....	51
19.	<a href="#"><u>Al la Sennaciularo</u></a> (originalo) .....	52
20.	<a href="#"><u>Gejunulara ĵurkanto</u></a> (juda) .....	54
21.	<a href="#"><u>Varŝavjanka</u></a> (pola) .....	59
22.	<a href="#"><u>Lodziejanka</u></a> (pola) .....	61
23.	<a href="#"><u>Ventegoj hurlu ĉirkaŭ ni</u></a> (pola) .....	62
24.	<a href="#"><u>Popolvolana himno</u></a> (rusa, antaŭ 1917) .....	64
25.	<a href="#"><u>Dubinuŝka</u></a> (rusa, antaŭ 1917) .....	66
26.	<a href="#"><u>Kremla Sonorado</u></a> (post 1917) .....	69
27.	<a href="#"><u>Redonu mian monon</u></a> (angla) .....	70
28.	<a href="#"><u>Kanto kontraŭmilitarista</u></a> (nederl.) .....	72
29.	<a href="#"><u>Fil' de l' labor'</u></a> (sveda) .....	74
30.	<a href="#"><u>Revolucio</u></a> (franca) .....	76
31.	<a href="#"><u>Himno de la subpremitoj</u></a> (itala) .....	80
32.	<a href="#"><u>El la kamparana milito 1525</u></a> (germana) .....	82
33.	<a href="#"><u>Funebra marŝo</u></a> (rusa) .....	84
34.	<a href="#"><u>Kanto de Siberiaj ekzilitoj</u></a> (pola) .....	86
35.	<a href="#"><u>Min kondamnu juĝantaro</u></a> (pola) .....	88
36.	<a href="#"><u>Katenmazuro</u></a> (pola) .....	90
37.	<a href="#"><u>En malliberejo</u></a> (estona) .....	92
38.	<a href="#"><u>Kanto de l' laboro</u></a> (pola) .....	93
39.	<a href="#"><u>Maja Marŝo</u></a> (pola) .....	95
40.	<a href="#"><u>Estingiĝis radi' de l' espero</u></a> (pola) .....	98
41.	<a href="#"><u>Filo de l' popolo</u></a> (germana) .....	99
42.	<a href="#"><u>Tord Foleson</u></a> (norvega) .....	101
43.	<a href="#"><u>Mallibereja</u></a> (ĉeka) .....	106

44.	<a href="#"><u>Laboristoj ekvekiĝu!</u></a> (angla) .....	107
45.	<a href="#"><u>Anarkista marŝo</u></a> (rusa) .....	108
46.	<a href="#"><u>Marŝo de la laboristoj en Esperanto</u></a> (originalo) .....	109
47.	<a href="#"><u>Ruĝa Regimento Varsovia</u></a> (pola) .....	111
48.	<a href="#"><u>Funebra kanto</u></a> (rusa) .....	114
49.	<a href="#"><u>Tenu la fortikaĵon!</u></a> (angla) .....	116
50.	<a href="#"><u>La ruĝarmeana stelo</u></a> (rusa) .....	117
51.	<a href="#"><u>Batalo</u></a> (bulgara) .....	120
52.	<a href="#"><u>En la drinkejo</u></a> (bulgara) .....	123
53.	<a href="#"><u>Antaŭen laboristaro</u></a> (hungara) .....	125
54.	<a href="#"><u>Al batal'!</u></a> (pola) .....	127
55.	<a href="#"><u>En malliberejo</u></a> (estona) .....	127
56.	<a href="#"><u>Ekstaru ni Proletaroj</u></a> (hungara) .....	129
57.	<a href="#"><u>Proletoj Unuiĝu!</u></a> (belga) .....	133
58.	<a href="#"><u>Ni rompu niajn ĉenojn!</u></a> (belga) .....	136
59.	<a href="#"><u>Laborista alvoko</u></a> (jugoslava) .....	138
60.	<a href="#"><u>Himno (tipografista)</u></a> , (jugoslava) .....	138
61.	<a href="#"><u>Marŝo de finna Laboristaro</u></a> (finna) ...	148
62.	<a href="#"><u>Mia preĝo</u></a> (bulgara) .....	150
63.	<a href="#"><u>Haĝi Dimitro</u></a> (bulgara) .....	152
64.	<a href="#"><u>La Soldata Kanto</u></a> (kastila) .....	156
65.	<a href="#"><u>La liberula kanto</u></a> (hispana) .....	159
66.	<a href="#"><u>La kanto de l' komunisto</u></a> (hispana) ..	161
67.	<a href="#"><u>Ni eltenu!</u></a> (finna) .....	162
68.	<a href="#"><u>La batalo de la ĉina revolucio</u></a> (ĉi	167

69.	<a href="#">Ĉina laborista kanto</a> (ĉina) .....	168
70.	<a href="#">Himno de l' laboristoj</a> (rusa) .....	169
71.	<a href="#">Ruĝarmeaniĝo</a> (rusa) .....	170
72.	<a href="#">La ĵuro</a> (hebrea) .....	172
73.	<a href="#">Kamarada kanto</a> (bulgara) .....	173
74.	<a href="#">La Karmanjolo 1924</a> (franca) .....	174
	Indeksoj .....	177



## Piednotoj

1. ↑ Pli ĝuste sub rubriko “Sennacieca”.
2. ↑ Dube, ĉu rusa, ĉu germanlingva originalteksto.
3. ↑ Pli ĝuste sub rubriko [“Sennacieca”](#).
4. ↑ Multaj kantoj meritis esti metataj sub tiu rubriko, kiujn vi trovas laŭ deveno sub aliaj rubrikoj kaj kiuj tamen laŭ sia esenco estus metendaj tien ĉi (ekz. no.j 2, 3, 5, 10, 45 k. a.). Sub tiu ĉi rubriko vi nur trovas



esperantajn originalaĵojn. Du esp. originalaĵojn de  
estona politarestito vi trovas sub “Estono”.

# About this digital edition

This e-book comes from the online library [Wikisource](http://wikisource.org)<sup>[1]</sup>. This multilingual digital library, built by volunteers, is committed to developing a free accessible collection of publications of every kind: novels, poems, magazines, letters...

We distribute our books for free, starting from works not copyrighted or published under a free license. You are free to use our e-books for any purpose (including commercial exploitation), under the terms of the [Creative Commons Attribution-ShareAlike 3.0 Unported](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/)<sup>[2]</sup> license or, at your choice, those of the [GNU FDL](https://www.gnu.org/licenses/fdl.html)<sup>[3]</sup>.

Wikisource is constantly looking for new members. During the realization of this book, it's possible that we made some errors. You can report them at [this page](#)<sup>[4]</sup>.

The following users contributed to this book:

- Wierzbowski

---

1. [↑ http://wikisource.org](http://wikisource.org)

2. [↑ http://www.creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0](http://www.creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0)
3. [↑ http://www.gnu.org/copyleft/fdl.html](http://www.gnu.org/copyleft/fdl.html)
4. [↑ http://wikisource.org/wiki/Wikisource:Scriptorium](http://wikisource.org/wiki/Wikisource:Scriptorium)